Österreichische
Nationalbibliothek

Majstro Jan Hus: la vivo, agado, kondamno kaj morto de l' glorinda martiro : (libro nepolitika)

eld. la verkinto

Vršce-Kopidlno; XA-AAAT 1905

Signatur: 702055-B

Barcode: +Z6534850X

Umfang: Bild 1 - 62

Nutzungsbedingungen
Die Österreichische Nationalbibliothek macht an diesen Inhalten kein eigenes urheberrechtliches Verwertungsrecht geltend. Sie erklärt sich insofern auch mit einer Nachnutzung dieser Inhalte in der abrufbaren Qualität ausdrücklich einverstanden. Dies gilt auch für die Verwendung dieser Inhalte in Online-Foren, Blogs und in Social-Media-Kanälen wie Facebook, Instagram, Pinterest etc.. Unabhängig davon sind allenfalls bestehende Rechte Dritter an den Inhalten vor jeglicher Nachnutzung vom Verwender individuell zu klären.

Bei einer Nutzung unserer Inhalte ersuchen wir um die Angabe eines Bildnachweises (Titel, Datierung und weitere verfügbare Beschreibungen) und um eine Quellenangabe (Zitierlink aus [Portal] und der Verweis "[Portal]/Österreichische Nationalbibliothek"). Für Postings auf Facebook oder Instagram ersuchen wir um Verlinkung des entsprechenden Accounts der Österreichischen Nationalbibliothek.

ÖSTERREICHISCHE
NATIONALBIBLIOTHEK

702055-B

Esp-



ÖNB
+Z6534850X

MAJSTRO JAN HUS.

LA VIVO, AGADO,
KONDAMNO KAJ MORTO DE L'GLORINDA MARTIRO.

(Libro **ne**politika.)

ESPERANTIGIS

J. F. KHUN.

KUN PORTRETO DE HUS KAJ KUN FRANCA KAJ ESPERANTA
ANTAŬPAROLOJ DE

Dʳᵉ CARLO BOURLET,

PROFESORO EN LA LERNEJO DE BELARTOJ KAJ EN LA LICEO
"SAINT-LOUIS", PREZIDANTO DE LA GRUPO ESPERANTISTA
PARIZA.

Kosto 80 heleroj = 85 centimoj.
(Por 5 ekz. 1 ekz. senpage.)

ELDONIS LA VERKINTO.
VRSCE-KOPIDLNO. REGNO BOHEMUJO.

El la presejo de la PRESA ESPERANTISTA SOCIETO, 33, rue Lacépède,
PARIS.

1905.



MAJSTRO JAN HUS.

MAJSTRO JAN HUS.

LA VIVO, AGADO,
KONDAMNO KAJ MORTO DE L' GLORINDA MARTIRO.

ESPERANTIGIS

J. F. KHUN.

KUN PORTRETO DE HUS KAJ KUN FRANCA KAJ ESPERANTA
ANTAŬPAROLOJ DE

D^RO CARLO BOURLET,

PROFESORO EN LA LERNEJO DE BELARTOJ KAJ EN LA LICEO
»SAINT-LOUIS«, PREZIDANTO DE LA GRUPO ESPERANTISTA
PARIZA.

ELDONIS LA VERKINTO.
VRSCE-KOPIDLNO. REGNO BOHEMUJO.

702055-B

Préface.

Le XIX-ième Siècle, qui sera plus tard l' un des plus grands siècles de l' histoire, fut *le Siècle de la Science.* Il a doté le monde d' inventions impérissables, a utilisé la vapeur, a découvert l' électricité, a développé la physique, a créé la chimie, en un mot a fondé l' industrie.

Cette industrie, fille de la Science, a couvert le monde d' un admirable réseau de moyens de communication. Les bateaux à vapeur, les chemins de fer, les automobiles, le télégraphe et le téléphone ont supprimé les distances et ont abattu les barrières *matérielles* qui séparaient les peuples.

Aujourd' hui, moi Parisien, je puis, de mon bureau, parler par téléphone avec un habitant de Londres, de Berlin ou de Rome. Mais à quoi peut me servir ce téléphone si commode, si l' homme qui est à l' autre bout du fil parle une langue que je ne comprends pas et s' il ne comprend pas la mienne ? à quoi sert d' avoir supprimé les distances *matérielles,* si les distances *morales* subsistent !

Antaŭparolo.

La XIX-a jarcento, kiu estos venonte unu el la plej grandfamaj jarcentoj, estis la *Jarcento de la Scienco.* Ĝi dotis la mondon per elpensitaĵoj ne pereeblaj, utiligis la vaporon, eltrovis la elektron, elvolvis la fizikon, kreis la ĥemion, unuvorte fondis la industrion.

Tiu industrio, ido de la Scienco, kovris la teron per admirinda retaĵo de komunikiloj. La vaporŝipoj, la fervojoj, la aŭtomobiloj, la telegrafo kaj la telefono forigis la distancojn kaj disbatis la barilojn *materialajn,* kiuj disigis la popolojn.

Hodiaŭ mi Parizano povas en mia skribocambro paroli telefone kun Londonano, Berlinano kaj Romano. Sed por kio povas al mi utili ĉi-tiu telefono tiel oportuna, se la homo, kiu staras ĉe l' alia finiĝo de l' fadeno, parolas lingvon, kiun mi ne komprenas, kaj se li ne komprenas la mian ? Por kio utilas, ke oni forigis la distancojn *materialajn,* se la distancoj *moralaj* daŭras !

Le XIX-ième Siècle a rapproché les corps ; le XX-ième Siècle doit maintenant rapprocher les esprits, pour complèter l' oeuvre de son prèdécesseur.

Le rêve idéal serait d' uniformiser le langage humain sur toute la terre, d' avoir une langue unique qui serait *la langue de l' humanité.*

Mais ce rêve est une utopie irréalisable car, en admettant même qu' on parvienne à décider tous les peuples à abandonner leur langue maternelle, à oublier leurs gloires passées, à suicider leurs propres littératures, l' union d' un jour, obtenue aprés d' immenses efforts, disparaîtrait aussitôt née. Dans la bouche du peuple, parlée entre gens d' un même pays, la langue commune se déformerait rapidement et nous recommencerions l' ancienne aventure de Babel. Les langues nationales, les dialectes locaux réapparaîtraient aussitôt.

Laissons donc à chaque peuple sa langue, ses coutumes, ses idées conformes à son caractère, à ses conditions d' existence, à son climat. Ne détruisons pas cette source de bonheur et d' énergie qu' est ce que nous appelons la *patrie !*

Le problème à résoudre est plus simple, car il nous suffit d' adopter une langue seconde, une langue neutre que tout homme apprendra à côté de sa langue maternelle et dont il ne se servira qu' avec les étrangers.

La XIX-a jarcento alproksimigis la korpojn ; la XX-a jarcento devas nun alproksimigi la spiritojn por plenigi la verkon de sia antaŭulo.

La revo ideala estus unuformigi la parolaĵon homan sur la tuta tero, havi unu solan lingvon, kiu estus la *lingvo de la homaro,*

Sed tiu ĉi revo estas utopio ne efektivigebla ĉar, eĉ supozante, ke oni povos decidigi ĉiujn popolojn al forlaso de iliaj lingvoj gepatraj, al forgeso de iliaj gloroj pasintaj, al memmortigo de iliaj propraj literaturoj naciaj, la unueco unutaga penege akirita malaperus tuj post naskiĝo. En la buŝo popola, parolata inter samlandanoj, la komuna lingvo aliformiĝus rapide kaj ni rekomencus l' antikvan aventuron Babelan. La lingvoj naciaj, la dialektoj lokaj tuj reaperus.

Ni lasu do al ĉiu popolo ĝian lingvon, ĝiajn kutimojn, ĝiajn ideojn konformajn je ĝia karaktero, ĝiaj kondiĉoj de vivo, ĝia klimato. Ni ne detruu tiun fonton de feliĉo kaj de energio, kiu estas tio, kion ni nomas *patrujo !*

La problemo solvinda estas pli simpla, ĉar sufiĉas, ke ni alprenas lingvon duan, lingvon neŭtralan, kiun ĉiu homo lernos flanke de sia gepatra lingvo kaj kiun li uzos nur kun fremduloj.

Et cette langue existe; elle est simple, facile, harmonieuse, claire, capable de tout dire et de tout exprimer depuis les quelques mots du voyageur qui demande sa route jusqu' à la subtile pensée d' un profond philosophe.

Cette langue c' est l' **Esperanto.**

Voici 17 ans que Zamenhof, le génial auteur de cette belle oeuvre, lutte pour la faire connaître et que le monde aveugle et sourd refuse de voir et d' entendre.

Tel est le sort de tous les grands novateurs qui ont toujours commencé par être des incompris!

Tel fut le sort de Jean Hus, dont notre courageux compagnon de lutte Mr. J. F. Khun nous retrace avec talent l' histoire. Le temps de l' inquisition est passé, la Science a étouffé l' intolérance et on n' élèvera plus aujourd' hui un bûcher pour brûler Zamenhof.

Mais la Science n' a pas encore tué l' indifférence et c' est contre elle que nous avons à combattre.

En lisant la vie de Jean Hus, les espérantistes ne pourront s' empêcher de faire des rapprochements. Aux moeurs, aux coutumes, aux temps près, c' est *notre* histoire.

Jean Hus c' est aujourd' hui Zamenhof et nous, les Espérantistes, sommes les fidèles Bohèmes qui écoutent sa parole et suivent son exemple.

Kaj tiu lingvo ekzistas; ĝi estas simpla, facila, harmonia, klara, kapabla ĉion diri kaj ĉion esprimi de la kelkaj vortoj de l' vojaĝanto, kiu demandas pri sia vojo, ĝis la delikatega penso de profundema filozofo.

Tiu lingvo estas **Esperanto.**

Jen de 17 jaroj Zamenhof, la genia aŭtoro de tiu bela verko bataladas por konigi ĝin kaj la mondo blinda kaj surda rifuzas vidi kaj aŭdi.

Tia estas la sorto de ĉiuj grandaj novigantoj, kiuj ĉiam komence estis nekomprenataj!

Tia estis la sorto de Jan Hus, kies historion nia kuraĝa kunbatalanto S-ro J. F. Khun talente al ni rakontas. La tempo de l' inkvizicio forpasis, la Scienco sufokigis la pensan sentoleremon kaj oni ne starigos plu hodiaŭ lignaron por bruligi Zamenhof'on.

Sed la Scienco ne ankoraŭ mortigis la indiferentemon kaj kontraŭ tiu ĉi ni devas nun militi.

Legante la vivon de Jan Hus, la esperantistoj ne povos sin deteni fari kunkomparojn. Kun la diferenco de l' moroj, de l' kutimoj, de l' tempo, ĝi estas *nia* historio.

Jan Hus estas hodiaŭ Zamenhof kaj ni Esperantistoj estas la fidelaj bohemoj, kiuj aŭskultas lian parolon kaj sekvas lian ekzemplon.

Mais voici l' aurore qui point, la lumière qui se fait ! Lentement, sûrement l' Esperanto se répand sur la terre entière ; les Sociétés de propagande se multiplient, les journaux naissent partout ; le monde s' éveille.

Courage donc, frères Espérantistes, tenons nous fortement les mains, soyons unis dans le combat, le triomphe est prochain !

Paris, le 1ier Avril 1904.

Carlo Bourlet.

Sed jen ektagiĝas, jen la lumo fariĝas ! Malrapide, certe Esperanto disvastiĝas sur la tuta tero ; la propagandaj Societoj multiĝas, la ĵurnaloj ĉie naskiĝas ; la mondo ekvekiĝas.

Kuraĝe do fratoj Esperantistoj, ni tenu al ni forte la manojn, ni estu unuiĝaj en la batalado ; baldaŭa estas la triumfo !

Parizo, la 1an de aprilo 1904.

Carlo Bourlet.

Ĉi tiu verketo estis skribita por honorigi inter tutmondaj Esperantistoj la glorindan nomon de l' granda turmentito, al kiu ĝi estu dedičata.

Mi ĉerpis kaj esperantigis ĉiun teĵon el bohemaj (čekaj) verkoj de: Fr. Palacký, Jan Kollár, D-ro J. Pekař, D-ro Jul. Grégr, Jos. Černý, *Prof.* D-ro T. G. Masaryk, Ant. Hajn, Jos. Klika, Jan Hejret *kaj* Jar. Spáčil. *La verko de* D-ro V. Flajšhans *komencis tiam eliradi. — Por la korekto de la verketo mi varme dankas S-ron profesoron* D-ron Carlo Bourlet *kaj S-ron instruiston* Th. Čejka.

J. F. Khun.

» Serĉu la veron, aŭdu la veron, lernu la veron, amu la veron, defendu la veron ĝis la morto ! «

M. J. H.

Majstro JAN HUS ! Kiom da rememoroj venas en kapon kun la nomo de ĉi tiu predikisto de la purigo de l' eklezio !

Majstro Jan Hus estis lumo en la malluma meza epoko. Lia glorinda persono brilis dum la tempo de l' universala falo de l' eklezio kaj de ĝiaj servantoj, kiam la senmorala vivo kune kun la sanktaĵvendado anstataŭis la veran leĝon de Kristo kaj lian imitadon. Li estas la plej firma kolono en la muro de la tuta reformacio ; li estas patro, gvidinto kaj spegulo de ĉiuj reformatoroj.

En la progreso de pensado de sia tempo li potence signis novan vojon ; ni admiras lin kiel viron alte eminentan, kiu, per sia heroa decido, al utilo de la vero alportis la plej grandan eblan oferon : la memvolan, insultitan kaj doloran morton.

Ni Bohemoj havas la honoron *esti montrintaj la vojon al la ideoj de libereco konscienca*, metante nin en batalon kun la potenca Romo, efektive ne sen grandaj oferoj.

Ĉu ni povas forgesi nian grandan Jan Hus ? Waldus kaj Wikleff estas radikoj de la reformacio, ankoraŭ kaŝitaj en la tero kaj nevideblaj ; Hus estas la vera trunko kaj arbo ; Luther estas floro kaj frukto. Hus komencis la reformacion, Luther finis ĝin. Hus penege konstruis la vojon, sur kiu Luther jam oportune paŝis, — Hus mortis por la reformacio, Luther nur vivis por ĝi.

Dum la meza epoko la eklezio fariĝis plej alta direktilo de la homaro; ĝi prenis ĉiun homon tuj de lia naskiĝo kaj gvidis lin ĝis al la entombiĝo. Ĉiu ajn homo estis plene sub ĝia potenco kaj devis laŭ ĝiaj ordonoj direkti sian vivon, por ke li ne estu suspektata, juĝata kaj eĉ punata. La herezo, kiun oni hodiaŭ ne punas plu, estis tiam la plej granda homa krimo.

Ju pli la ekstera aŭtoritato de eklezio fortiĝis, des pli malalte faladis la religio en ĝia esenco. Krista ordono de l' amo al Dio kaj al proksimulo cedis antaŭ la konstante amasigata instruo dogma; la amo al Dio kaj al proksimulo havis pli malgrandan indon, ol kompreno de l' konfuzita instruo kaj de la multigitaj misteroj ekleziaj. La reprezentantoj de l' eklezio postulis antaŭ ĉio la obeemon por la aliaj, la aŭtoritaton por si. Ili mem ne vivadis plu je l' apostola maniero. De l' monarĥoj ili ricevis riĉaĵojn kaj privilegiojn. La deziron je la monda regado forkuris la deziron je dia regno. Kaj eĉ tion ĉi la eklezio atingis. Kiam do la papeco estis je la supro de l' monda potenco, la sortoj de ĉiuj kristanaj reĝoj dependis de ĝi. La krueleco politika, materiala kaj morala venkis super la homo. Homa konscio kaj spirito estis katenigataj, regataj. Ve al tiu, kiu volis havi la rajton de kritiko kaj de libera pensado! Por tiu estis jam antaŭe preparita la brullignaro kiel por herezulo!

⁂

Herezuloj! Ili ne povis porti la pezegan portaĵon de l' neeblaj, netolereblaj aranĝaĵoj, leĝoj, aŭtoritatoj. El kruela regado de l' mondaj kaj ekleziaj potencoj ili per forto ekglitis en la spacon de la libereco kaj komencis faligi la sistemojn tenatajn kaj sanktigitajn per maldiligenta tradicio kaj kalkulemo de l' egoistoj.

Ili ekbruligis la lumon de la spirito, ili instigis la disvolviĝon de nova pensado, de nova vero. Ili levis pli alten la pensadon kaj instruadis novajn preĝojn; ili konstruis novajn altarojn al la spirito kaj al ĝia vero.

Ili dolore sentis la malaltigadon de la homaro, kiu ĉesis progresigi sian vivon kaj sian historion, kaj nur en sklava humileco suferis la regadon de l' tiranoj, kiuj pensis anstataŭ ili, direktis iliajn sortojn, kruele silentigante la ĝemojn de ilia rifuzo.

Ili eklevis fieran memkonfidan kapon kaj eldiris sentime admonantajn vortojn pri la netolereblaj cirkonstancoj. Ili malkvietigis la trankvilecon de l' tiranoj oportune vivantaj en volupto kaj ĝuado.

Leviĝis krimuloj-herezuloj, kaj ili ekskuis la putritan kvietecon de l' societaj aranĝaĵoj, predikante bezonon de renaskiĝo.

Kaj tiujn ĉi herezulojn benos venontaj generacioj kaj dankeme rememoriĝos ilian laboron, ilian kuraĝon kaj ribelon. Nia estanteco kaj pli bone estonteco vidos en ilia krima herezemo la komencojn de progreso, kaj ni hodiaŭ dankeme gloras ilian memoron.

Ni bezonis herezulojn kaj bezonos ilin. Eĉ estonte devos aperi homoj eminentaj kaj fortaj, kiuj sentos bezonon de ilia tempo kaj ekdiros kaj defendos ĝin per ilia forta energio. Ankaŭ ili maltrankviligos la egalpezon kaj silenton de l' kutimaj formoj kaj opinioj. Ankaŭ ili estos persekutataj kaj kiel krimuloj kondamnataj. Ili estos brulantaj oferoj, brilantaj torĉoj al pli altaj kaj pli bonaj celoj de l' vivo.

Ankaŭ venonte la herezuloj demandos, kio kaj kie estas la vero. Ili serĉados la pli bonan sencon de l' vivo, ili klopodos pri la scienca kaj morala renaskiĝo de la spirito, pri la altigo, liberigo kaj egalrajtigo de l' homoj.

Ili trairados la fajron de provoj, tentoj kaj suferoj. Ili faros batalon sanktigan sen instigiĝoj malaltaj kaj egoistaj, nur por nobligo de l' homaro, kaj ili staros en unuaj vicoj de l' novaj batalantoj.

Ni nur volu kaj sciu fariĝi nacio de herezuloj!

Al ni estu sanktaj nek Romo nek ĉiuj, kiuj volus gvidi nin al ĝi. Ni ne bezonu perantojn por nia savo, ni mem estu niaj savantoj. Ni ne bezonu konsilojn, dank' al kiuj trompiĝas la mondo, kunpremiĝas la libereco, ruiniĝas la rajtoj kaj kontraktoj, neniiĝas la egalvaloro, kaj dank' al kiuj oni starigas hontigajn diferencojn inter la homoj.

Ni sciu eviti, ke noblaj ideoj ne estu detruataj kaj kaŝataj per falsa praktiko, ke ne daŭru la regoj de despotismo. La timo antaŭ aŭtoritatoj, regoj kaj privilegioj estu al ni ridinda; kaj la klopodoj por forpreni la prudenton aŭ sklavigi ĝin, por vekadi en ĝi blindan kredon al dogmoj, por akcepti ordonojn de nepensado, obeemo, suferemo kaj de falsa modesteco — ĉi tiuj klopodoj al ni estu la objektoj de la plej obstina kontraŭbatalo.

Se ni estos herezuloj, la kaŭzo de ĉi tio estos eble ne nur sola agordemo de l' nekontentemuloj, sed ĉi tia herezo havus superfluon da kaŭzoj: la terura efektiveco de krimoj, voluptemoj, malmoralaĵoj kaj malhonesteco, monamo, malvirgigeco, sensenteco kaj maldelikateco. Por ni hodiaŭaj herezuloj la celo de niaj deziroj ne estu la regno de mortaj dogmoj, sed la regno de viva, fluanta, refreŝiga scienco; kaj la simplaj ordonoj de la moralaj veroj de Kristo estu por ni super la leĝaro de l' ekleziuloj.

Ni turnu la popolon al ĝi mem, ni donu al ĝi kapablon regadi sian cerbon kaj koron. Ni inokulu al la popolo, per helpo de klerigo, ion, kio povus spirite gvidi ĝin kaj anstataŭi la gvidadon de l' ekstera meĥanismo kaj de la premo de l' aŭtoritato. Kaj ĉi tio devas esti moderna, kapabla al la viv-

ado kaj al plua progreso kaj devas havi freŝan kaj daŭran forton.

Jen kial ni bezonis herezulojn frutempajn. Kvankam ili estis siatempaj pensuloj kaj povis doni al ni nur fruktojn de sia spirito plena je la tiamaj ideoj, al ni ne malutilas anaĥronismoj, kiujn oni ne povas kompari kun la bezonoj de la nuna tempo. Similaj faktoj al ni povas manki. Ni eltiras el ili nur tion, per kio ili eterne vivos, kiel fontoj de bonaj instigoj. Ni ŝatas precipe ilian karakteron kaj la manieron, per kiu ili sciis valorigi sin mem.

Ili volis kaj sciis esti siaj kaj fortaj. Ili sciis diferenci sin kaj altiĝi super sian ĉirkaŭaĵon ne pro ambicio, ne pro gloro kaj profito. Ili sciis esti seneraraj, sinsciantaj, konsciencemaj, seriozaj kaj severaj, kvankam popolamantaj kaj agrablaj; sentimaj antaŭ la postulo kaj leĝo de la vero, sinceraj kaj malfermkoraj, noble kuraĝaj. Multaj belaj spiritaj ecoj ĉonis al ili memkonfidon kaj sendependigis ilin. Ilia konscienco sukcesis esti harmonio de la medito kaj sento; ĝi sciis esti aktiva, celojn kaj manierojn de l'agado antaŭdifinanta.

Ili sciis starigi kaj defendi la rajton de la pensado kontraŭ la mehanika, mortiganta premo de l' ekstera aŭtoritato.

Ili estis krimuloj. Ili ne estis similaj al homoj, kiuj kondamnis ilin. Ili disdonadis puŝojn supren kaj pro tio estis kondamnataj. Ilia veremeco kaj sentimeco ekkomprenis la malsanon de l'societo, predikis kontraŭ ĝi kun severaj admonoj.

Por konservi ordon kaj trankvilon, oni devis aresti kaj pereigi ilin. La feliĉo de l'putranta kaj malvivule odoranta societo postulis oferojn de iliaj korpoj.

La krimuloj-herezuloj eĉ spite la polica prudentemeco de nunaj potencoj tamen lumigas kaj

altiras nin. Ĉi tia lumo de iliaj oferoj estas tiel deloganta!

Ho, ke ni posedu la kapablon, esti herezuloj!

⁂

La tero por la reforma movado estis jam preparita per la popola sektemeco en Bohemujo simile kiel en aliaj landoj eŭropaj precipe per la sekto de valdanoj. Ĉi tiu sekto estis fondita de Petro Waldus en Lyon en jaro 1170; el Francujo ĝi disvastiĝis post j. 1184. Ĝia penado estis turnadi la vivon al simplaj manieroj de l'unuatempa eklezio; tial ĝi instruis, ke la papeco, la senpekigo, la ceremonioj k. t. p. — ĉio tio estas homa elpensaĵo; ke ĉia ĵuro estas peko; ke preĝi oni povas ĉie; konfesi pekojn oni povas eĉ al privataj personoj; ankaŭ bapti povas ĉiu k. t. p.

Homoj, kiuj agis kontraŭ malindaj aranĝaĵoj ekleziaj estis plue: Italo Marsiglio el Padua (1270—1343), Angloj: William Okkam († 1349) kaj John Wikleff (1324—1384), Francoj: Pierre ab Alliako (1350—1420) kaj Jean Gerson (1363—1429), Germano Kunrad Waldhauser († 1369), Bohemoj: Milič z Kroměříže († 1374 en Romo) kaj Matěj z Janova († 1394).

⁂

Jan Hus naskiĝis en jaro 1364. Lia patro, malriĉa kampoposedanto, translokiĝis en urbeton Husinec, tiam vilaĝeto kreskiĝanta sub la kastelo. Hus en submontara pejzaĝo en sudokcidenta Bohemujo. Ĉi tie do naskiĝis nia venonta reformanto. Lia patrino gvidis lin al piemeco. La juna Jan vizitadis latinan lernejon en la proksima urbo Prachatice; ĉar li bone lernis, liaj gepatroj sendis lin en la universitaton en Praha, kie li devis fidi pli multe

sian talentan kapon ol librojn. Kiel malriĉa studento li perlaboris je la kantado en preĝejoj.

Dum jaro 1393 li fariĝis bakalario de liberaj artoj, dum la sekvanta jaro bakalario de l' teologio. En j. 1396 li estis gradigita majstro de liberaj artoj (doktoro). Post 4 jaroj li estis sanktigita pastro, dum 1401 li estis gradigita estro de l' universitata fakultato filozofia kaj en 1402 rektoro de l' universitato. En tiu sama jaro li fariĝis predikisto de l' kapelo Betlema en Praha. Tiu ĉi kapelo estis fondita de du civilaj personoj, por ke oni prediku al popolo dufoje dum semajno en lingvo bohema. Dum ĉi tiu tempo Hus ĉesis ami ĉion, kio estas de tiu ĉi mondo: li diligente studis la biblion. Li precipe penis en siaj predikoj konigi la plej puran veron, malkaŭdi erarojn, disvastigitajn en la eklezio, kaj gvidi la popolon al pia, morala kaj vere kristana vivo. Kion li vorte predikis, ĉi tion li ankaŭ per sia agado kaj vivo pruvis.

Inter aŭdantoj de predikoj de Hus en la kapelo Betlema ĉeestadis ne nur la simpla popolo, sed venadis aŭdi lin ankaŭ kleraj homoj, majstroj, pastroj, nobelaj sinjoroj kaj sinjorinoj. Eĉ en la reĝan korton alvenis la famo pri la elokventa, kuraĝema predikisto kaj pri lia pura, ekzempla vivo; ties rezultato estis, ke la reĝino Sofio, edzino de la reĝo Václav IV. faris lin sia konfesprenanto. La reĝo mem estis favora al Hus, kaj la ĉefepiskopo Zbyněk Zajic z Hazenburka, sciante pri lia fervoreco kaj pri liaj bonaj penoj, honorigis lin per sia konfido.

Sed plej multe estimis, eĉ adoris lin la popolo bohema. La vortoj de Hus estis sanktaj al ĝi. Kaj en ĝi trovis Hus la plej sincerajn samideanojn, kiuj la predikitajn verojn laŭdis, sekvis kaj per agado plenumadis.

Dum la tempoj de Hus la lingvo de kleruloj kaj precipe de scienculoj estis lingvo latina. La majstroj

ĉe la universitatoj instruadis kaj skribadis siajn verkojn en ĉi tiu lingvo. En Praha, egale kiel en grandaj urboj bohemaj, la riĉaj urbanoj parolis ankaŭ germane, ĉar la lastaj Přemyslidoj, fondante urbojn, alvokadis Bohemujon Germanojn kaj donis al ili multajn privilegiojn.

Por lingvo bohema estis do tre grava afero, ke estis fondita la kapelo Betlema, rezervita por bohemaj predikadoj, kaj ke la predikisto estis Hus. Hus ne nur predikis, sed ankaŭ skribis por tiuj, kiuj ne povis aŭdi lin, multajn belajn librojn, kiuj neniam perdos sian valoron, kaj restos ĉiam ornamoj de l' bohema literaturo. Jam antaŭ Hus komencis skribi bohemajn verkojn filozofiajn boheme Tóma Štítný. Sed tiam neekzistis ankoraŭ ia literatura lingvo bohema. Hus prenis dialekton, en kiu oni parolis en kaj ĉirkaŭ Praha, kiel fundo kaj kreis la lingvon literaturan, kio estis tre malfacila afero. La ortografio bohema ne havis literojn por multaj vokaloj. Hus komparis alfabetojn latinan, germanan, hebrean, grekan kaj eĉ glagolan kaj simpligis la boheman skribmanieron: anstataŭ $c_{\check{}}$, $s_{\check{}}$, $r_{\check{}}$ li skribis $\check{c}$, $\check{s}$, $\check{r}$;*) plue li komencis signi la longajn vokalojn (*á, é, í*). Per tio li tre perfektigis la boheman ortografion.

El liaj multenombraj verkoj kaj verketoj ni nomas nur: La Postillon, la Klarigon de l' kredo, de dek ordonoj diaj, de la preĝo »Patro nia«, la Filineton, la boheman prilaboron de verkoj de Wikleff kaj multajn leterojn el arestejo. En liaj verkoj paroladis lia animo: eĉ pri aferoj plej abstraktaj li parolas per varma plastiko de l' juna, tiam naskiĝanta literatura lingvo; en sia stilo li estas historiografo, jurnalisto, parolanto, poeto. Li klare prezentas la enhavon al simpla leganto, vi-

*) Tiel skribas 9,500.000 Bohemoj (kun Slovakoj), Kroatoj, Slovenoj, Serboj lusaciaj kaj esperantistoj: *ć, ś* k. t. p.

vigas ĝin per ekzemploj el vivo, el historio kaj Biblio. *)

Ĉefa fonto de l' pensoj reformaj, de la kritiko de l' hierarhio kaj eklezio estis efektive la verkoj de Wikleff, konitaj en Praha jam dum la fino de XIV. centjaro kaj konstante pli estimitaj de bohemaj majstroj de l' universitato. La 28. de majo 1403 kondamnis la germana plimulto de majstroj, spite la protestoj de l' bohemaj majstroj, la verkojn de Wikleff kune kun la ĉefa predikisto de ili kaj ordonis neinstruadi laŭ ili, sed la Bohemoj proklamis sin por la verkoj, precipe por la opinioj de Wikleff pri la eklezio. Kelkaj alprenis eĉ la kiel hereza proklamitan artikolon pri la transsubstancio (pri la spirita ĉeesteco de Kristo en la altara sakramento). Ŝajnas, ke Hus komence kliniĝis al ĉi tiu artikolo, sed pli malfrue li ne konsentis kun Wikleff.

Oni komprenas, ke devis veni konflikto. Sed mirinde, Hus ĝuis favoron krom ĉe la kortego eĉ ĉe la ĉefepiskopo; jam en jaroj 1407 kaj 1408, kiam la roma papo kulpigis mem la reĝon Václav, ke li helpas herezulojn, komencas la ĉefepiskopo pli severe agi kontraŭ la verkoj de Wikleff, ordonante fordoni liajn librojn en sian korton por ekzameni; samatempe li malpermesis hontigantajn parolaĵojn pri la pastroj. Per tio la pastroj estis kuraĝigitaj kontraŭ Hus.

La ĉefepiskopo nomis lin en tiu tempo predikisto sinoda, t. e. Hus havis la rajton kaj devon prediki al pastroj, kiam ili kunvenadis en konferencoj. Hus, kiu amis la veron super ĉio, egale kiel li malamis la pekon super ĉio, antaŭ la ĉefepiskopo mem kuraĝis paroladi al kunvenintoj akrajn admonantajn vortojn. Eĉ la ĉefepiskopon mem li neesceptis el sia admono. Li eĉ al li memorigis

*) Literatura karakteristiko de D-ro Jar. Vlček.

lian devon peni kaj zorgi pri bona prospero de la regataj pastroj. Sed pro tiaj predikaĵoj Hus faris aĵ si nur ankoraŭ pli multajn malamikojn. La pastroj kulpigis lin ĉe la ĉefepiskopo.

Ni jam scias, ke krom la malbonaj moroj de l' pastroj la dupapeco malpaciencigis la kredantojn. Unu papo loĝis en Romo, la dua en la franca urbo Avignono. Kiam do en j. 1378 la papo translokiĝis en Avignonon, kaj la francaj kardinaloj elektis kontraŭ lia roma posteulo sian papon rezidantan en Avignono, estis konstante du papoj; ili reciproke malbenis unu la alian, la eklezio estis disigita, kaj ĝia falo finita. La kardinaloj mem intencis kunvenigi la universalan koncilion eklezian en la itala urbo Pizo (Pisa) la 25. de marto 1409. La bohema reĝo Václav plezure sciiĝis pri tiu intenco ne nur pro kaŭzoj religiaj, sed eĉ politikaj. Oni devis en Pizo forigi la malpacon de eklezianoj. Krom tio Václav deziris, ke la venonta kunveno konsideru lin kiel la vera roma reĝo kaj neniel lian rivalon Ruprecht. Li do akceptis la proponon de la franca reĝo, ke liaj landoj ĉesu obei ambaŭ tiamajn papojn ĝis la decido de la koncilio. Pri similaj aferoj decidadis tiam la universitatoj; la reĝo Václav petis do la universitaton en Praha, ke ĝi decidu por la neŭtraleco al ambaŭ papoj. Sed la universitato ne faris laŭ lia deziro, — ĝi decidis kontraŭ la neŭtraleco.

La universitato en Praha ne estis efektive bohema universitato. Kiam Karolo IV. fondis ĝin, li proklamis, ke ĝi estas fondita por la loĝantaro de la regno Bohemujo. Sed ĉar ekzistis neniaj altaj lernejoj en la tuta meza Eŭropo, studis en Praha multaj studentoj el najbaraj landoj, eĉ el Danujo kaj Svedujo. La studentoj estis dividitaj laŭ kvar nacioj: bohema, pola, saksa kaj bavara. Oni voĉdonis laŭ nacioj, — la nacio bohema havis ĉiam nur unu voĉon. Ĉiuj Bohemoj deziris havi plimulton da voĉoj.

Per kontraŭstaro incitita reĝo eldonis dekreton kutnohoran (en urbo Kutná Hora) la 18. de januaro 1409. Per ĉi tiu dekreto ricevis bohema nacio tri voĉojn kaj la aliaj tri nacioj kune nur unu voĉon. Post kvar tagoj la reĝo ordonis ne obei la roman papon, t. e. li ordonis la neŭtralecon.

La reĝo decidis laŭ konsilo de Hus kaj lia amiko majstro Jeroným Pražský, sed li estis tre kolera pri Hus, kiun li opiniis kiel kaŭzo de l' nova religia movado.

Bohema nacio tre profitis el la reĝa decido. Germanaj profesoroj kaj studentoj tiel koleris, ke ili foriris el Praha kaj fondis novan universitaton en Leipzig (1409). Praha sentis materialan domaĝon en la komerco, sed la loĝantaro bohema supreniĝis. La bohemeco de la ĉefurbo estis certigita. Ree unu merito de Hus, kvankam li ne malamis Germanojn, dirante, ke li pli amus bonan Germanon ol malbonan Bohemon.

Dume kunvenis la koncilio Piza: Václav estis proklamita kiel germana imperiestro. La kardinaloj elektis novan papon: Aleksandron V. Sed ambaŭ antaŭaj: Gregoro XII. kaj Benedikto XIII. ne volis eksiĝi. Estis do de nun tri papoj. Václav subtenis Aleksandron.

La ĉefepiskopo Zbyněk fine turnis sin de Gregoro kaj ankaŭ favoris Aleksandron kaj tuj plendis ĉe li, ke en la regno Bohema disvastiĝas la instruo hereza de Wikleff. Samatempe li petis la papon, ke li severe kontraŭagu.

La papo ordonis, ke la ĉefepiskopo per tuta forto kaj potenco haltu la disvastigadon de ĉi tiuj herezoj. Li devis malpermesi la predikon en lokoj senrajtigitaj, kaj forpreni ĉiujn librojn de Wikleff.

Ĉi tiu ordono celis kontraŭ Hus kaj la kapelo Betlema. La papa bulo pri ĝi alvenis en Bohemujon la 9. de marto 1410. Tiel la opinioj de Hus daŭrige kontraŭstariĝis al tiuj de hierarĥio.

La verkoj de Wikleff maltrankviligis la pastraron en Anglujo. Oni eltiris el ili 24 artikolojn, kiuj estis proklamitaj kiel herezaj. Unu el majstroj de universitato en Praha aldonis ankaŭ 21 artikolojn eltiritajn el libroj de Wikleff kaj liveris ĉiujn 45 al kanonikoj en Praha. Ili sendis ilin al rektoro de l'universitato, por ke ĉiuj majstroj prijuĝu la artikolojn.

Inter defendintoj de Wikleff la plej eminentaj estis: Mikuláš ze Znojma, Štěpán Páleč kaj Jan Hus. Ĉar la plimulto de majstroj estis kontraŭ Wikleff, oni decidis, ke ĉi tiujn artikolojn neniu instruu kaj proklamu kiel publike tiel private.

Per tio publika opinio estis maltrankviligita; la verkojn de Wikleff oni des pli legis kaj transskribadis. La kontraŭuloj turnis sin nun ĝis al papo. La ĉefepiskopo minacis per puno al ĉiuj anoj de Wikleff; kelkajn pastrojn li ordonis aresti.

Hus riproĉis al ĉefepiskopo, ke li forpelis diligentajn pastrojn kaj maldiligentulojn li lasas en trankvilo. La ĉefepiskopo ĉesis esti favora al Hus kaj koleris pri li, ordoninte, ke la verkoj de Wikleff estu forbruligitaj. Hus plendis al la papo kaj ne ĉesis prediki en la kapelo Betlema. Dume mortis la papo Aleksandro V. kaj estis elektita Johano XXIII. Sur la papa trono sidis multaj malbonaj homoj, sed ĉi tiu Johano XXIII. estis la plej mizera, estinte antaŭe mara rabisto. Ĉi tiu okazo kuraĝigis Hus'on; li predikis plu en la kapelo Betlema. Tiam la ĉefepiskopo ordonis bruligi la librojn de Wikleff en sia korto la 16. de julio 1410 kaj proklamis malbenon super Hus. Per ĉi tio li nur verŝis oleon en fajron: la popolo ekribelis kaj minacis al pastroj. La malbeno papa estis feste proklamita en ĉiuj preĝejoj laŭ ordono de papa juĝisto kardinalo Kolona (Colonna).

La papo Johano XXIII. militis kontraŭ la neapola reĝo Ladislav; ne havante monon, li proklamis, ke

ĉiu, kiu helpos lin, ricevos pardonon de la pekoj. Hus komencis kontraŭagi al ĉi tio, dirante, ke la eklezio ne devas militadi; ke estas peka afero kaj sanktaĵvendado donadi la pardonon de la pekoj por mono; ke la papo ne estas neerarebla. Krom Hus parolis akre kontraŭ la papo ankaŭ lia fidela amiko Jeroným Pražský. Imititaj papaj leteroj (buloj) pri la milito estis publike bruligitaj per la incitita popolo. Tri junuloj, kiuj en la preĝejoj laŭte kriis je la pastroj, kiuj proklamis la pardonon de la pekoj, estis kaptitaj kaj publike ekzekutitaj. Post tio la indigno de l'popolo atingis la plej altan gradon. La senkapigitajn korpojn oni feste forportis kantante: »Jen, ĉi tiuj estas sanktuloj.« Oni enterigis ilin en la kapelo Betlema. La popolo alvenis kaj honoris ilin kiel sanktajn turmentitojn.

Nun la kontraŭuloj penis per ĉiuj fortoj, ke la influo de Hus sur la popolo estu rompita. La teologia fakultato petis la reĝon, ke li malpermesu al Hus disvastigi nomitajn 45 artikolojn kaj prediki. La reĝo malpermesis la disvastigadon de ili, sed ne kontraŭagis predikojn. Hus defendis plu sian kaj viklefan instruon.

La pastroj plendis nun al papo mem, ke Hus predikas, kvankam li estas malbenita. La papo ordonis, ke la malbeno denove estu proklamita feste dum la sonorado; neniu devis doni al Hus loĝejon manĝaĵon kaj trinkaĵon; neniu devis paroli kun en la loko, kie Hus loĝis, oni ne devis dioservadi kaj doni sakramentojn al kredantoj; la mortintojn oni ne devis enterigi, kaj Hus en okazo de sia morto ne devus esti kristane enterigita. Oni ankaŭ ordonis, ke Hus estu senliberigita kaj fordonita al oficoj ekleziaj; la kapelo Betlema devis esti fermita.

Ĉi tiu tre severa malpermeso netimigis Hus'on; sed ĝi terurigis kelkajn el siaj amikoj ĝistiamaj, precipe Štěpán Páleč, kiu fariĝis nun lia plej granda kontraŭulo kaj malamiko.

La reĝo Václav penis forigi malpacon. Li petis do Hus'on, ke li foriru memvole el Praha por kelka tempo. Hus obeis kaj foriris al sia bonfaranto Jan z Ústí en la kastelon Kozí Hrádek, proksime de la malfrue fondita de Husanoj urbo Tábor en suda Bohemujo. Tie li skribis siajn bohemajn verkojn kaj fervore predikis al simpla popolo, kiu venadis el malproksima ĉirkaŭaĵo aŭdi amatan majstron. Kiam Hus iris prediki en ian alian lokon, tutaj anaroj sekvis lin, por ke ili denove aŭdu liajn vortojn.

La famo pri Hus iris tra la tuta lando. Kiam li transloĝiĝis en kastelon Krakovec, la popolo venis eĉ el malproksimaj urboj aŭdi lin. En la tuta lando ne ekzistis nomo, kiun oni eldirus kun tia estimo kaj amo, kiel la nomon de majstro Jan Hus.

Tiam estis tri papoj; naskiĝadis do konstantaj diferencoj kaj kontraŭaĵoj, ĉar ĉiu papo havis siajn partianojn inter monarĥoj kaj ekleziaj altranguloj. Oni devis do fari decidan agon. Ĉi tion sciis kaj sentis la papoj mem, la kardinaloj, abatoj kaj ĉiuj pastroj; ĉi tion sciis ankaŭ mondaj estraroj. Tial penadis precipe la frato de l' bohema reĝo Václav, germana imperiestro Sigmund, ke estu kunvokita ĝenerala koncilio eklezia, kie oni devos formeti ĉiujn kaŭzojn de l' malutilaj kontraŭaĵoj ekleziaj.

La kardinaloj kaj la imperiestro Sigmund interkonsentis, ke la koncilio fariĝu la 1-an de novembro 1414 en germana urbo Konstanco ĉe la Bodena lago.

Ĉar la husana movado en Bohemujo fariĝis danĝera por la eklezio, penis Sigmund, kiel estonta reĝo de Bohemujo, ke ĉi tiu afero estu pacigita en la Konstanca koncilio. Tial li volis, ke Hus iru en la koncilion. Li traktis kun Hus per helpo de du bohemaj nobeloj Jindřich Lefl z Lažan kaj Mikeš Divůček z Jemniště, promesante al li plenan certecon dum la vojaĝo kaj eĉ en la koncilio.

Hus estis do preta iri en Konstancon. Tiam estis la ĉefepiskopo Zbyněk jam mortinta; lia posteulo Konrado konfesis al Hus, ke li ne kulpigas lin je herezo.

Hus preparis sin al la vojaĝo; precipe li prenis ĉion, kio povus pruvi lian senkulpon, ĉar li sciis, ke liaj malamikoj, — kiuj estis antaŭe liaj amikoj (Páleč), — iros Konstancon por kulpigi lin. Oni kolektis inter amikoj kaj anoj multe da mono por la vojaĝo.

Hus antaŭsentis, ke li ne revenos; li skribis sian testamenton kaj al siaj »karaj kaj fidelaj amikoj« publikan leteron, kiu montras lian piemecon kaj konfidon en Dio, egale kiel lian amon al siaj amikoj kaj konatoj. En ĉi tiu letero Hus petas ĉiujn, ke ili preĝu por li persisti en bataloj kaj tentoj kaj ne timi la morton.

Jam la 11-an de oktobro 1414 entreprenis Hus veturon en Konstancon por purigi sin mem kaj la boheman nacion de la mallaŭdo de herezo. Liaj fidelaj amikoj Jan z Chlumu, Václav z Dubé kaj bakalario Petr z Mladenovic, kiu enskribadis ĉiujn okazintaĵojn, gvidis lin kaj estis al li gardistoj dum la longa vojaĝo.

En la germana urbo Nurnbergo la gvidantaro haltis por pli longa ripozo. Hus estis afable akceptita; tie kaj eĉ en aliaj lokoj, kie la gvidantaro haltis, Hus alnajligis proklamon sur la preĝejpordo, ke tiuj, kiuj intencas kulpigi lin je ia ago malprava, iru en koncilion eklezian, kaj diru tie sian plendon — ĉar li volis respondi ĝin tie.

El Nurnbergo veturis Václav z Dubé en la urbon Speyer sur la Rejno al imperiestro Sigmund, por ricevi de li la promesitan pasporton (glejton) por Hus.

La 3-an de novembro oni alvenis en Konstancon. Post du tagoj alveturis ankaŭ Václav z Dubé kun la pasporto de l'imperiestro Sigmund.

Konstanco estis plenigita de homoj pentrinde vestitaj. Alveturis eĉ la papo Johano XXIII. kun sia kortego; alvenis ankaŭ la kardinaloj, prelatoj, episkopoj kaj aliaj pastroj el okcidenta Eŭropo; alveturis imperiestro Sigmund kun sia gvidantaro, alvenis la scienculoj el ĉiuj landoj, la plej glorindaj majstroj kaj bakalarioj, la komercistoj kaj vendistoj de plej diversaj komercaĵoj; alvenis ankaŭ el ĉiuj partoj de Eŭropo multaj homoj senhonoraj, malvirgaj k. t. p. Oni kalkulis en Konstanco 150 milojn da homoj.

La precipaj celoj de l' Konstanca koncilio estis: 1-e, unuigo de l' eklezio kaj ĉesigo de la tripapeco; 2-e, la reformo de l' eklezio; 3-e, la forigo de l' instruo de Wikleff kaj Hus, ĉar ĝi detruis la tutan sistemon de l' hierarĥio kristana. Estas vero, ke Hus per sia instruo penadis reformi la eklezion; oni do ne devas miri, ke li komence esperis trovi multajn homojn en la koncilio de l' tuta eklezio, kiuj kun li egale kunsentas. Eble li ne konis ankoraŭ tiam la diferencon inter siaj penadoj kaj la klopodoj de l' koncilio, kaj li ne vidis ĉi tiun profundegaĵon, kiu malfermiĝis dum la kuro de l' tempo inter li kaj la tuta hierarĥio eklezia. Ĉar alia estis la opinio en la tuta koncilio, — alia estis la opinio persone.

Jam la duan tagon la gvidantoj de Hus, Jan z Chlumu kaj Henriko el Lacembok, iris al la papo, por lin avizi, ke Hus estas alveninta. Ili volis peti por gajni al li favoron. La papo promesis kompleze, ke Hus bezonas timi nenian malbonon. Sed la kontraŭuloj de Hus, precipe liaj antaŭaj amikoj el Bohemujo: Štěpán Páleč kaj Michal z Brodu, venis ankaŭ en Konstancon, por tie fervore kulpigi Hus'on. Ilia precipa peno celis malliberigi lin; tial ili elpensadis diversajn malverojn, nur por ke Hus estu aresti̇ta.

La 28-an de novembro alvenis en privatan lo-

ĝejon de Hus eĉ la vidvino Fida: la episkopoj Aŭgsburga kaj Tridenta kun la urbestro Konstanca, kaj petis Hus'on, ke li iru kun ili al la papo kaj kardinaloj. En la loĝejo ĉeestis Jan z Chlumu; li tuj eksentis, ke ĉi tio estas nur insido, kaj diris severe al episkopoj: »Mi havas Hus'on sub mia gardo. Li devas esti juĝata antaŭ la tuta koncilio, sed ne antaŭ la papo kaj kardinaloj.« Sed la Tridenta episkopo false parolis, ke li intencas nenion malbonan kontraŭ Hus. Foriris do Hus kune kun Jan z Chlumu kaj la senditoj en la kunvenon de la kardinaloj. Tie oni diris al Hus, ke li estos juĝata pro la herezoj, kiujn li instruis. Li respondis: »Mi venis bonvole, por respondi antaŭ la sankta koncilio, sed eĉ al vi, sanktaj patroj, mi volas respondi, kaj vi kredu, ke mi volas pli volonte morti, ol persisti en ia pruvita herezo.«

Tiam la kardinaloj foriris, kaj Hus kun sinjoro Jan z Chlumu restis solaj, sed sub gardo de soldatoj. Posttagmeze, post la kvara horo oni sciigis sinjoron z Chlumu, ke Hus devas resti tie, ĉar li povus forkuri, kaj ke sinjoro z Chlumu povas foriri.

Sinjoro z Chlumu ekkonis, ke ili estis trompitaj; li ekkoleris kaj petis, ke li povu paroli kun la papo. Eltrovinte lin, li riproĉis lin: »Plej sankta patro, kiel estas eble, ke mia samlandano povas esti arestita tie? Ĉar mi sciigis humile Vian Sanktecon, ke mi gvidas mian honorindan samlandanon laŭ ordono de Roma imperiestro, kaj ke mi havas la devon gardi lin; ankaŭ Via Sankteco certigis min, ke oni faros nenion malbonan al mia gardito.«

La papo tre embarasiĝis kaj penis formeti de si la kulpon de rompita promeso per ĉi tiu elturniĝo: »Miaj tie ĉeestantaj fratoj (kardinaloj) scias, ke mi neniam ordonis, ke Hus estu malliberigita.« Pli malfrue sciigis la papo sinjoron z Chlumu, ke la kardinaloj faris ĉi tion.

Tuj tiam oni forkondukis Hus'on en la domon

de ia kanoniko, kie li estis arestata dum ok tagoj; poste oni enmetis lin en arestejon de dominikana monaĥejo, en malluman kaj tre malsanigan kelon, apud kiu estis la kanalo, elfluiganta la malpuraĵojn el urbo en la lagon.

Ĉi tiu arestigo de Hus estis tute malprava; ĝi estis nur venĝo, ĝi estis ago maljusta, malnobla kaj nehumana. Jan z Chlumu klopodis liberigi sian amikon; li klarigis, ke Hus estas maljuste arestita, ĉar li havas la pasporton de Sigmund. Fine li alnajligis sur la pordo de l' episkopa preĝejo la leteron en la lingvoj latina kaj germana, en kiu li publike protestis kontraŭ farita maljusteco.

Estas vero, ke Sigmund vojaĝinte en Konstancon, kolere ordonis, ke Hus estu liberigita, alie ke li malfermigos la pordon de l' arestejo perforte. Alveninte Konstancon, li uzis sian influon je la kardinaloj, por liberigi Hus'on.

Ili povis pacigi lian koleron kaj konsciencon per letero, en kiu ili skribis ke oni ne devas teni vorton al herezulo. Efektive honestaj homoj tenas vorton al ĉiu. Nun Sigmund lasis kardinalojn agi kun Hus laŭvole; pli malfrue li eĉ parolis kontraŭ Hus. Li nur tial koleris, ĉar lia vorto estis rompita, kio estis ofendo por li. Ĉar li permesis, ke Hus estu arestita, li prave meritas la nomon imperiestro-vortorompinto . . .

Mallumo kaj malagrabla odoro haltigas nin, tuj kiam ni enpaŝas la arestejon. Kiam niaj okuloj kutimis je la mallumo, kaj ni povas iom vidi, ni ekkonas, ke en angulo sur lito kaduka kuŝas viro apenaŭ moviĝanta.

Ni alpaŝas pli proksimen kaj kun teruro ni vidas, ke tie kuŝas en febro tiu pia bonfaranto de l' bohema popolo; tiu, kiu por ĉiuj preĝis, kiu deziris bonfarton al ĉiu, ke tie kuŝas en malsanego nia majstro Jan Hus! Kaj kiel li ŝanĝiĝis! La larmoj fluas sur niaj vangoj, kiam ni vidas lin tiel

ŝanĝitan. Bedaŭri lin devus ĉiu homo, kiu ne havas ŝtonan koron. Sed, kiuj ne havis bedaŭron por li — estis la kardinaloj kaj liaj malamikoj. La plej obstina de ĉi tiuj estis lia antaŭa amiko Štěpán Páleč. Li venis ankaŭ arestejon, sed ne por bedaŭri Hus'on. Li treege insultis lin, dirante, ke de la naskiĝo de Kristo ne ekzistis pli granda herezulo krom Wikleff kaj li.

Oni devas miri, ke Hus ne pereis en ĉi tiu arestejo; post plendo kaj peno de l' bohemaj sinjoroj, li estis transportita la 8-an de januaro 1415 en pli bonan loĝejon en tiu sama monaĥejo, kie li rapide iom saniĝis, tiel ke li povis skribi leteron al siaj samlandanoj, en kiu li sciigis ilin pri sia malsano kaj petis, ke ili preĝu por li.

Jan z Chlumu konstante vartis lin, donadis al liaj gardistoj diversajn donacojn, por povi alporti librojn kaj ricevi de Hus leterojn por liaj amikoj.

Dum la malsano de Hus oni aŭskultis liajn kontraŭulojn, por ke oni povu skribi la plendon; oni kondukis multajn el ili en la arestejon, kie ili devis ĵuri antaŭ la malsanegulo. Kiam li pli saniĝis, oni liveris al li la plendon en 42 artikoloj, skribitan de Páleč. Hus laŭ povo respondis tuj al la plendo.

Tiam, kiam Hus estis en Konstanco, komencis en Praha majstro Jakoubek ze Stříbra instrui, ke oni devas liveri la sakramenton altaran sub la formo de pano kaj vino al ĉiuj kredantoj. Sed ĉar inter amikoj de Hus ne estis unueco en tiu ĉi afero, oni skribis al Hus en Konstancon, ke li diru sian opinion. Hus respondis komence, ke ĉi tio ne estas necesa, sed ke oni ne povas kontraŭdiri ĝin. Poste Hus tute aliĝis al instruo de Jakoubek, pri kio li ankaŭ skribis Praha'n. Ĉiuj Husanoj nune unuiĝis kaj jam tiutempe la kaliko, el kiu oni liveris la vinon dum la komunio, fariĝis la videbla signo de

Husanoj, kiujn oni nomis ankaŭ la »kalikanoj« aŭ »utrakvistoj«.

Dume en la Konstanca koncilio okazis gravaj aferoj. La kardinaloj konsentis, ke ĉiuj tri papoj: Gregoro VII., Benedikto XIII. kaj Johano XXIII. eksiĝu. Ĉi tiu lasta jam antaŭ ia tempo promesis eksiĝi, tuj kiam oni kulpigis lin en 54 artikoloj pro lia malbona vivo. Pli malfrue li ŝajnis bedaŭri sian promeson kaj petis, ke oni translokigu la koncilion en ian italan urbon. Estis do videble, ke li intencas foriri. La imperiestro Sigmund ordonis do, ke la urbaj pordegoj estu zorgeme garditaj. Sed la papo prosperis alivestiĝi kaj nokte de 20—21. de marto nekonite forkuri el la urbo.

Kiam oni rimarkis, ke la papo malaperis, naskiĝis granda konfuzo kaj ribelo: la popolamaso rabis la butikojn de l' vendistoj, la urbestro vokis la urbanojn al bataliloj, la popolo kuris konfuzi sur la stratoj, kaj ŝajnis subite, ke okazos la detruo de l' koncilio. Sigmund rajdadis inter la maltrankviligita popolo kaj persone admonadis al trankvileco. Tiel prosperis al li fari ordon. Post kelkaj tagoj la koncilio eksigis Johanon de papeco.

La forkuro de l' papo faris ankaŭ ŝanĝon en aresto de Hus. La gardistoj de lia arestejo sekvinte la papon, liveris la ŝlosilojn de l' arestejo al imperiestro, kiu povis tuj liberigi la arestiton. Sed li ne faris tion, konsiliĝante kun kardinaloj, kiel trakti Hus'on. En la konsiliĝo oni decidis, ke Hus estu subordonita al episkopo de Konstanco; ĉi tiu translokigis lin en proksiman kastelon Gottlieben.

La arestejo en Gottlieben estis ankoraŭ pli kruela; tage oni metadis katenojn sur la piedojn de Hus, nokte oni ligadis eĉ liajn manojn al muro. Ankaŭ lia nutraĵo estis tre malbona; tial Hus denove malsaniĝis.

Vane subskribis 250 nobeluloj el Bohemujo kaj Moravio severan leteron al Sigmund, en kiu ili plen-

dis, ke oni maljuste agis kaj agas kontraŭ Hus, kaj ili petis, ke li estu forlasita el arestejo kaj povu reveni sian patrujon. La kardinaloj respondis, ke Hus neniel povos esti liberigita. Sed Sigmund, kiu donis al li la pasporton, silentis al ĉi tio.

La porpetanta letero de bohemaj kaj moraviaj nobeluloj estas bona pruvo, kiel en Bohemujo kaj Moravio oni estimis kaj amis Hus'on, kaj kiel ĉiuj Bohemoj estis konvinkitaj pri lia senkulpeco. Malmola kaj fiera respondo de kardinaloj montris ilian fierecon kaj sensentecon. Fine la silento de Sigmund estis nova pruvo de lia vortorompeco.

Kaŭze de la forkuro de l' papo la koncilio nomis por la eldemandado de Hus 4 novajn juĝistojn: kardinalon Petro de Aliako, kardinalon Vilhelmo de Kordio, unu episkopon kaj unu abaton. Malbona signo estis, ke jam la 4. de majo (1415) oni kondamnis 45 artikolojn de Wikleff kaj lin mem oni proklamis kiel herezulo; Hus do certe ne povis eviti ĉi tiun sorton.

Oni transkondukis lin el la Gottlieben'a kastelo en la monaĥejon franciskanan en Konstanco; kaj — mirinda okazo! — tiun saman tagon oni arestigis en ĉi tiu kastelo ankaŭ la ekspapon Johanon XXIII: Baltazaron Cossa.

***

Estas merkredo, la 5. de junio 1415. Ni ĉeestas en la manĝejo de l' monaĥejo de Minoritoj, plenigita je kardinaloj, ĉefepiskopoj, episkopoj, prelatoj, doktoroj, majstroj kaj multaj homoj aliaj. Ĉeestas ankaŭ la Bohemo Petr z Mladenovic kaj unu alia, kiu vidis jam antaŭe skribitan kaj preparitan kondamnon de Hus! Al koncilio prezidas la kardinalo Johano de Brogni.

Unu el la pli junaj koncilianoj legas longan kulpigon, enhavantan ankaŭ citojn el verkoj de Hus, proklamitaj de juĝantoj kiel herezaj. Post

la lego la gardistoj kondukas Hus'on en la kunvenon; li estas sidigita apude. Sur la tablo antaŭ Hus kuŝas lia verko »Pri la eklezio« kaj kelkaj leteroj skribitaj per lia mano.

La *juĝanto* demandas: »Majstro Johano el Husinec, ĉu vi konas ĉi tie kuŝantajn verkojn kaj leterojn kaj ĉu vi konfesas, ke vi skribis ilin propramane? Mi demandas en la nomo de ĉi tiu sankta kunveno.«

Hus (prenante la manuskriptojn, zorgeme trarigardas ĉion) poste respondas sentime: »Jes, via Moŝto, mi certigas kaj ne neigas, ke mi bone konas ĉiujn ĉi verkojn; jes, mi konfesas, ke mi ĉiujn skribis propramane kaj kun plena konscio. Mi ne scias, kiujn artikolojn kaj tezojn oni trovis malĝustajn aŭ eĉ herezajn, sed mi humile proklamas, ke mi pravigos, revokos kaj korektos ĉion, se oni pruvos al mi el Biblio kaj el verkoj de sanktaj patroj, ke mi skribis ion herezan aŭ instruis ian herezon«.

La leganto relegas antaŭ Hus la kulpigon kaj la tezojn trovintajn kiel herezaj.

Hus komencas ĉe kelkaj artikoloj defendi sin.

Voĉoj: »Silentu! Vi ne devas paroli! Ĉesu tuj!«

Hus: »Mi devas sciigi al sankta koncilio, ke multaj el miaj pensoj estis malĝuste enskribitaj kaj malĝuste esprimitaj.«

Voĉoj: »Ĉesu filozofi!«

Alia voĉo: »Vi nur ne elturniĝu!«

La *prezidanto*, kardinalo de Brogni: »Majstro Johano, vi devas nur respondi: jes aŭ ne! Vi evitu ĉiun superfluan parolon!«

Hus atentigas je la vortoj de sankta patro Origeno.

Voĉo: »Ili ne apartenas tien ĉi.«

Hus silentas.

Voĉoj: »Kial vi nun silentas? Oni vidas, ke vi estas herezulo!«

Hus (kun levita kapo sin turnante al prezidanto, kuraĝe kaj majeste): »Tre honorinda patro, mi supozis, ke en ĉi tiu kunveno mi trovos pli grandan disciplinon, honestecon kaj justecon. Kiel mi povas defendi min, se oni malpermesas paroli al mi, kaj se mi parolas, oni opinias ĉi tion kiel malbone?«

Prezidanto: »Majstro Johano el Husinec, kiel vi parolas? En la kastelo Gottlieben vi estis pli modesta; tie vi parolis pli humile!«

Hus: »Tre honorinda patro, en la kastelo estis efektive alie; tie mi povis paroli, ĉar neniu interrompis min. Sed tie ĉi preskaŭ la tuta kunveno krias kaj malhelpas min paroli...«

Post la kunveno oni forkondukis Hus'on denove en arestejon; apud li staris liaj amikoj. Li premis varmege iliajn manojn.

Duafoje oni juĝis Hus'on en plena koncilio tuj tri tagojn poste, vendredo la 7. de junio 1415. La kunveno estis ankoraŭ pli multenombra kaj pli brilanta; ĉeestis la imperiestro Sigmund kun sia tuta kortego. Venis ankaŭ multaj bohemaj nobeluloj. La koncilion prezidis la kardinalo Petro de Aliako. Hus'on oni alkondukis jam antaŭ la komenco.

La parolanto de l'koncilio tralegas diversajn kulpigojn, kaj Hus respondas ilin kiel homo kun pura konscienco: trankvile, sed firme kaj certe. Kontraŭ unu kulpigo li defendis sin per longa parolado.

Post lia finiĝo, proklamas *Vilhelmo*, angla doktoro: »Sankta kunveno, la parolado, kiun la kulpigita majstro ĵus faris, profunde tuŝis min; mi lin atente sekvis kaj konvinkiĝis, ke la kulpigiton oni ne devas kondamni, ĉar li klare pruvis, ke lia opinio estas prava kaj ortodoksa.«

La *parolinto de l'koncilio:* »Majstro Johano, oni kulpigas vin ankoraŭ, ke vi malgraŭ la ordono de plej sankta patro (papo) rifuĝis al Kristo; sed

la plej sankta patro estas la vikario de l' Kristo sur la tero.«

Hus: »Jes, mi konfesas, ke mi faris tiel. Se sankta patro eĉ estas la vikario de Kristo sur la tero, tamen oni ne povas kredi pri li, ke li estas ne erarebla kaj plej justa; li restas *nur homo* kaj havas, egale kiel aliaj homoj, mankojn homajn. Mi ne povas paroli alie, ol ke li estis malbone sciigita pri mia afero; kaj se li ne volis aŭdi min, mi turnis min rekte al Kristo, kiel juĝanto ĉionscianta kaj plej justa«.

Parolinto: »Majstro Johano, ĉu estas vere, ke vi fanfaronis, ke vi bonvole venis en la koncilion, kaj ke nek la reĝo Václav, nek ĉeestanta lia Moŝto la Roma Imperiestro Sigmund ne povis devigi vin veturi en Konstancon?«

Hus: »Jes; ĉi tio estas vero, kaj miaj vortoj estas pravaj.«

Sinjoro *Jan z Chlumu:* »Permesu al mi en ĉi tiu sankta koncilio paroli kelkajn vortojn kiel konfirmo de l'vero pri tio, kion mia gardito tie ĉi diris. Estas pura vero, ke Majstro Jan estas la persono plej amata de la Bohemoj, de popolo kaj eĉ de nobeloj. Ĉe ni ekzistas multaj tre potencaj sinjoroj, kiuj estus pretaj en siaj kasteloj akcepti Majstron Jan en certecon kaj tie defendi lin kontraŭ ĉia potenco.«

La *imperiestro Sigmund* (turnante sin al Hus): »Kara Majstro Johano! Vero estas, ke mi donis al vi la pasporton, kaj ke mi zorgis por vi dum veturo, kvankam mi ne devas fari tion al homo, kulpigita je la herezo. Per tio mi faris, kion mi promesis fari, kaj nun mi havas por vi nur la admonon, ke vi submetu vin al la sankta koncilio kaj petu pardonon. Se vi ne faros tiel, vi portos sekvojn de ĉi tio. Mi povas fari por vi nenion plu, ĉar mi ne devas ŝirmi herezulojn. Mi konsilas al vi ankoraŭ unu fojon, ke vi submetu vin al la sankta koncilio!«

Tria eldemandado fariĝis tuj la duan tagon, sabato la 8. de junio. Ĉio estis kiel dum la dua eldemandado. Oni demandis Hus'on, kaj li respondis kaj defendis sin.

Poste la *prezidanto* diris al li: »Majstro Johano, post la eldemandado mi sciigas vin, ke vi povas elekti: Aŭ vi submetu vin, kaj poste ni indulge agos kun vi, aŭ vi persistu, kaj ni permesos vin, ke vi defendu vian instruon; sed mi atentigas vin, ke en la okazo, se vi estos proklamita herezulo, ni ne havos indulgon por vi.«

Hus: »Tre honorinda patro, mi ne venis en la sanktan koncilion por persisti en mia opinio, sed por ricevi instruon pri io pli bona, kaj mi volonte revokos mian instruon, se oni konvinkos min, ke mi eraris. Mi povas tuj diri, ke mi ne povos repreni *ĉiujn* miajn tezojn proklamitajn kiel herezaj, ĉar mi dirus mensogon en plej grava afero, per kio mi ŝarĝus mian konsciencon por eterne, kaj mi prave devus esti kondamnita.«

Post la finiĝo de tria eldemandado la *imperiestro Sigmund,* la vortorompinto, pensis, ke neniu fremda aŭdas lin, kaj li diris al ĉefepiskopoj mallaŭte: »Honorindaj patroj, inter la artikoloj, kiujn Hus konfesis, ĉiu sufiĉus, mi pensas, por ke li estu kondamnita; tial se li ne volos deĵuri sian instruon, vi *bruligu* lin aŭ vi faru, kiel vi trovos plej bone. Sed mi konsilus al vi ne kredi al li, eĉ se li estus deĵurinta; mi ankaŭ ne kredus al li. Revenonte en Bohemujon, li farus ankoraŭ pli multe da malbono ol antaŭe.«

❋

La koncilio eklezia tre penadis, ke Hus revoku ĉion, kion oni riproĉis al li kaj proklamis kiel hereza. Oni antaŭmetis al li proponon de l' revoko, kiu estis sufiĉe modera, sed Hus ne konsentis eĉ

kun ĝi. Li devis fari tion, ĉar li estis homo honesta, nobla kaj justa.

Oni penadis konvinki lin, ke li per la revoko montrus, ke li estas vera filo de l'eklezio, kaj ke ĉi tio ne malhelpos lian ĥonoron; kontraŭe, ke li havos meriton. Venis eĉ Stĕpán Páleč kaj konsilis al Hus, ke li revoku. Hus konstante respondadis, ke lia konscienco neniel permesas al li proklami kiel hereza tion, kion li ĝis nun opinias kiel bona kaj justa.

Li diris: »Pensu vin en mia situacio; kion farus vi, se vi certege scius, ke vi neniam instruis herezon, kaj se nun oni petus de vi, ke vi revoku?«

Hus tre ĝojis, ke lia malamiko Páleč venis konverti lin. Li parolis tiel kore, kvazaŭ nenio estus inter ili. Sed Hus montriĝis la plej nobla homo, petante sian malamikon, ke li pardonu lin, se li ofendis lin per ia pli malafabla vorto. Ĉi tia nobleco tuŝis eĉ Páleč ĝis ploro.

La 1. de julio sendis Hus al koncilio leteron, skribitan per vortoj moderaj kaj humilaj. La kardinaloj esperis, ke li tamen revokos. Oni sendis al li 4 episkopojn kaj eĉ bohemajn nobelulojn, por ke ili parolu kun li, kaj petu lin revoki. Sed Hus eĉ tiam respondis, ke li volas revoki nur tiam, se oni *pruvos* al li, ke efektive estas hereza, kion li instruis. Ĉi tio estis la lasta provo.

En arestejo Hus ofte ege sopiris pri siaj fidelaj amikoj, pri lando Bohema kaj pri sia nacio. Unu fojon, kiam li estis suferanta de granda sopiro, li sidiĝis kaj kvazaŭ antaŭsentante sian proksiman morton, li skribis leteron »al la tuta nacio bohema«.

En ĉi tiu letero li forgesis neniun. Li admonis la popolon boheman, ke ĝi tenu la vorton dian; ke ĝi amu bonajn pastrojn kaj evitu la malbonajn. La sinjoroj estu bravaj kaj justaj por malriĉuloj. La urbanoj faru siajn komercojn juste, la metiistoj

laboru honore, la servantoj servu fidele por siaj mastroj. La instruistoj kaj profesoroj instruu siajn lernantojn konscience kaj en vero, la lernantoj kaj studentoj obeu siajn instruistojn kaj lernu ne pro egoismo kaj monda gloro, sed pro utileco de l'nacio. Plendinte, ke siaj plej obstinaj malamikoj estas kelkaj Bohemoj, li skribis ankoraŭ unufoje: *Mi petas vin, ke vi amu vin reciproke, ke vi ne lasu la bonulojn premitaj per fortego, kaj ke vi deziru la veron al ĉiu.*

En la leteroj de Hus speguliĝas lia tuta karaktero, tiel bona kaj nobla, ke oni povus lian karakteristikon skribi laŭ liaj leteroj.

La fundamento de lia karaktero estas vera piemeco; de ĝi fontas liaj faroj, kuraĝo kaj persistemo, amo al vero kaj al homoj. Al la piemeco aliĝas la konscienco sentema, trapenetranta, severe reganta.

Nur la konscienco igis Hus'on esti tia, kia li estis; la konscienco gvidis lin sur la predikejon, en la ekzilon, en Konstancon, sur la lignaron; li ne volis, li ne povis esti alia, ol li efektive estis: martiro de l'vero. La konscienco devigis lin, ke li en duboj prenu konsilon de l'amikoj, ke li decide kaj konstante stariĝu kontraŭ la suspekto de l'herezeco, intencante revoki, se li estos konvinkita el Biblio.

Hus estis plena de kristana amo; pro ĝi li pardonadis eĉ siajn malamikojn kaj deziris al ili amon dian, savon kaj ĉian bonon.

Hus estis humila kaj modesta; li estis konvinkita, ke ĉiuj liaj kontraŭaĵoj devenas de liaj pekoj; li petas do siajn amikojn kaj malamikojn, ke ili preĝu por li.

La veron li estimis super ĉio.

Kiel bela estas lia devizo:

»Serĉu la veron, aŭdu la veron, lernu la veron, amu la veron, defendu la veron ĝis la morto!«

Sabaton la 6. de julio 1415 faris la koncilio Konstanca la dekkvinan kunvenon en la preĝejo episkopa. Ĉi tiu kunveno estis unu el la plej gravaj kaj plej memorindaj. La kardinaloj, episkopoj, prelatoj kaj aliaj membroj de l' koncilio ĉeestis en plena nombro; la prezidanto estis la kardinalo de Brogni. Je lia flanko sidis la imperiestro Sigmund en sia alta trono en tuta lukso: apud li la vicgrafo Ludviko tenis sur kuseno la regnan pomon, Frederiko de Hohenzollern, kastelgrafo de Nurnbergo tenis la sceptron, Henriko, duko de Bavarujo la kronon, kaj unu hungara nobelulo la glavon. En la mezo de la preĝejo estis konstruita malgranda eŝafodo, simila al kovrita tableto, sur kiu superleviĝis vertikala ligno kun pendigitaj sur ĝi partoj de la vesto pastra.

Hus estis kondukita per ia episkopo el sia arestejo, sed devis atendi antaŭ la preĝejo inter soldataj gardistoj ĝis la fino de l' festa meso, kiun legis la ĉefepiskopo el Gnezdno. Nur post la meso suprenpaŝis la episkopo Lodna en la predikejon, kaj predikis laŭ vortoj de l' apostolo Paŭlo, ke »estu ruinigita la korpo pekinta«; oni enkondukis Hus'on en la preĝejon ĵus antaŭ la eŝafodeton. Li falis sur genuojn kaj preĝis. La predikanto parolis dume pri la devo de l' reĝo, forigi ĉiun herezon el la eklezio kristana. Post la prediko, kiam la koncilio devis komenci agadon, oni proklamis, ke neniu sen puno devas malhelpi la agon nek per interrompo de l' parolo, nek per eldiro de konsento aŭ mallaŭdo. Poste oni legis kelkajn el 260 artikoloj herezaj, kiujn la universitato Oksforda eltiris el verkoj de Wikleff, kaj oni kondamnis ilin kiel herezaj kaj bruligindaj. La prokuratoro de l' koncilio, Henriko de Pino, petis, ke la sankta kunveno finu la disputon kontraŭ Hus kaj proklamu definitivan kondamnon. Poste eniris en la predikejon papa aŭditoro Bertoldo de Wildungen kaj komence li legis

30 artikolojn el verkoj de Hus. — Jam dum la unua komencis Hus korekti ĝian signifon; sed la kardinalo Petro de Aliako stariĝis kontraŭ li, dirante:

»Silentu nun, poste vi povos ĉion respondi.«

Hus ne silentis kaj diris:

»Sed kiel mi povos ĉion respondi, se mi ne povas ĉion memori?«

Kiam li poste volis paroli kontraŭ aliaj artikoloj, leviĝis la kardinalo Zarabella kaj diris al li:

»Ni jam sufiĉe aŭdis de vi.«

Kaj sin turnante al soldatoj apude starantaj, li ordonis, ke ili devigu lin silenti. Majstro Hus do kunmetis la manojn kaj petis altavoĉe:

»Pro Dio mi petas, aŭdu min, ke la ĉirkaŭstarantoj ne pensu, ke mi diris iajn herezojn; poste vi faru kun mi, kion vi volos.«

Sed tamen ne povinte paroli, li falis sur genuojn, kaj ŝajnis, ke li rigardante ĉielon preĝas, rekomendante sian aferon al Dio. Ĉi tion li faris poste ankoraŭ kelkafoje. Poste oni legis la kulpigojn: aŭdinte tiujn samajn plendaĵojn, kiujn li pensis jam longe pravigitajn; aŭdinte eĉ novajn kulpigojn, ĝis nun nekonatajn, precipe ke li sin nomis kvara persono en la Sankta Triunuo: tiam Hus spite ĉiu malhelpo denove pro Dio petis, ke oni aŭdu lian veran intencon; li konfirmis, ke li neniam ĉi tion instruis. Poste oni eĉ tion proklamis kiel peko kontraŭ Dio, ke li en sia disputo kontraŭ la papo sin turnis de eklezio al Kristo mem. Hus defendis sin per vortoj de Biblio kaj aldonis al siaj jam kelkafoje ripetitaj vortoj, ke li alvenis en la koncilion el libera propra volo, havinte konfidon al la imperiestro Sigmund ĉi tie estanta kaj al lia pasporto, intencante montri sian senkulpecon al tuta mondo. Dirinte ĉi tiujn vortojn, Hus rigardis al Sigmund, — kies vangoj ruĝiĝis. Li ne povis toleri tiun elokventan rigardon.

Kiam estis ĉiuj kulpigoj tralegitaj, oni ordonis al episkopo Konkordiena, ke li legu antaŭe la kondamnon de l'verkoj de Hus kaj de lia instruo, poste la kondamnon de Hus mem. Liaj verkoj estis tute kondamnitaj al forbruligo. Hus ree parolis kontraŭ tio, dirante:

»Kiel vi povas kondamni miajn verkojn, ne montrinte al mi ion pli bonan kaj ne povinte pruvi eĉ unu herezon en miaj verkoj; kaj kiel vi povas kondamni miajn bohemajn verkojn, kiujn vi eĉ ne vidis?«

Sed la tre maljuna episkopo legis plue, ke Hus estas efektiva herezulo, ĉar li predikis instruon herezan, malbonigantan kaj ribeligantan; ke li delogis multajn homojn, malhonorigis la potencon kaj estimon de l'eklezio katolika kaj de l'papa trono, kaj ke li tute obstiniĝis en sia krimo; li do devas esti ekspastrigita, ekssanktigita kaj al oficoj fordonita, ĉar plua afero jam ne koncernas eklezion.

Hus aŭdis sian kondamnon sur la genuoj, kun okuloj rigardantaj al ĉielo; kiam la episkopo finis la legon, li nur laŭte preĝis por siaj malamikoj dirante:

»Jesuo Kristo, pardonu ĉiujn miajn malamikojn per granda Via mizerikordio; Vi scias, ke oni maljuste kondamnis min, false min kulpiginte kaj plendinte; pardonu ilin per senfina pardonemo Via!«

Kiam li parolis ĉi tiujn vortojn, multaj kardinaloj kaj episkopoj tre maltrankviliĝis, ilin kiel krimo proklamis kaj mokis ilin.

Post finiĝo de la lego la koncilio komencis plenumi la juĝan decidon. Antaŭ la preĝejo apud la pordego de la tombejo oni konstruis lignaron, metis la verkojn de Hus sur ĝin kaj ekbruligis. Al Milana ĉefepiskopo kaj al ses episkopoj oni ordonis tuj ekspastrigi lin. Ili alvenis al Hus kaj malsupren preninte la mesajn vestojn pendintajn sur la

vertikala ligno, ili komencis vestigi lin. Vestiĝinte la albon, Hus diris al si mem :

» Oni mokis Jesuon Kriston, kiam Li estis kondukita de Herodo al Pilato, vestinte Lin en blankan veston. «

Kiam li havis jam sur sia korpo la kazulon kaj stolon, episkopoj metis kalikon en liajn manojn kaj admonis lin ankoraŭ unufoje, ke li revoku siajn herezojn kaj ĵure rifuzu ilin. Tiam Hus suprenpaŝis sur eŝafodeton, antaŭ kiu oni vestis lin, kaj turniĝinte al amasiĝinta popolo, li diris dolore kaj kun larmoj en okuloj :

» Jen, ĉi tiuj episkopoj admonas min, ke mi revoku kaj ĵure rifuzu; mi timas fari tion por ne esti mensoginto antaŭ Dio, por ne ofendi mian konsciencon, ĉar mi neniam instruis herezojn, pro kiuj oni kulpigas min ; kaj mi tamen instruus kaj predikus rektan malon. Mi ne povas fari tion, por ne maltrankviligi la popolon, al kiu mi predikadis kaj la pastrojn, kiuj ankaŭ prave predikas. «

Kiam li parolis ĉi tion, diris la anoj de l' koncilio :

» Nun ni vidas, ke vi estas obstina en via kolero kaj nekonvinkebla en via herezo. «

Kiam li malsupreniris de l' eŝafodeto, oni komencis ekspastrigi lin. Oni prenis la kalikon de li, poste la vestaĵojn unu post la alia, terure malbeninte lin, kiel oni dum ĉi tia okazo ordinare faras. Kiam fine eĉ lia pastra tonsuro devis esti ruinigita, la episkopoj komencis disputi reciproke, kiel fari tion. Uzinte tiun momenton, Hus turnis sin al Sigmund dirante :

» Jen, ĉi tiuj episkopoj eĉ ne scias konsenti pri mia turmentigo «.

Forŝirante per la prenilo lian tonsuron, diris la episkopoj ĉi tiujn vortojn :

» La eklezio forprenis de vi ĉiujn rajtojn kaj plue afero jam ne koncernas ĝin. Ni fordonas vin al monda potenco ! «

Kaj stariginte sur lian kapon altan paperan kronon kun tri pentritaj diabloj, ŝirantaj pekintan animon, kaj kun skribitaj vortoj »Jen ĉefherezulo!«, ili rimarkis :

»Ni fordonas vian animon al diablo!«

Hus respondis, kunmetinte siajn manojn kaj rigardante al ĉielo :

»Kaj mi fordonas ĝin al plej afabla Jesuo Kristo«. — Ekrigardinte la kronon, li diris :

»Jesuo Kristo por mi mizerulo portis pli malmolan kaj pli multepezan kronon antaŭ sia senkulpa morto, kaj mi mizera pekinto portos do humile mian kronon pli malpezan kvankam malhonorigantan — por lia nomo kaj por vero.«

Nun donis Sigmund signon kaj ordonon al vicgrafo Ludviko preni Hus'on kiel arestiton en sian potencon. La vicgrafo formetis la pomon reĝan, akceptis Hus'on, kiu staris inter soldatoj, kaj fordonis lin al Konstanca urbestraro dirante :

»Prenu Hus'on, kiu laŭ ordono de nia imperiestro plej estimata devas esti bruligita kiel herezulo.«

Sed efektivigi la ekzekuton havis rajton nek Sigmund, nek la vicgrafo, ĉar Hus estante regato de l'reĝo bohema, apartenis sub la rajtopotenco de l'reĝo Václav IV, kaj oni estus devinta fordoni lin je punigo al li.

Senprokraste estis plenumita la ekzekuto; la koncilio dume daŭrigis sian agadon. La soldatoj, ĉirkaŭ mil personoj, prenis Hus'on kaj forkondukis lin el la preĝejo; sennombraj rigardantoj sekvis ilin, kaj preskaŭ la tuta urbo aliĝis al la funebra sekvantaro, en kiu ĉeestis ankaŭ la vicgrafo Ludviko, rajdante kun kelkaj aliaj nobeluloj.

Elirinte el la preĝejo, Hus vidis fajron sur la tombejo; en ĝi oni bruligis liajn verkojn. Li dolore ridetis. Al morto li iris per firmaj paŝoj, kantante psalmojn aŭ preĝante; oni ne vidis ian timon aŭ

malgajon en lia rigardo. Kaŭze de grandega nombro da popolo, oni paŝis nur malrapide kaj devis kelkafoje halti. Tiam parolis Hus al popolo ĉirkaŭiranta, ne kredi, ke li mortas kiel herezulo. Fine li alvenis sur ekzekutplaco, kiu estis antaŭ la urbo je la okcidento, kontraŭ la kastelo Gottlieben, inter ĝardenoj kaj herbejoj. Ekrigardinte la lignaron jam preparitan kaj la krudan palison, al kiu oni lin alligos, li ŝajnis ĝoji en sia spirito. Li falis antaŭ la paliso sur la genuojn, dismetis la manojn kaj rigardante al ĉielo, li preĝis, dirante la vortojn de la psalmo :

» Sinjoro, kompatu je mi ! En Vi mi kredis, Sinjoro, en Viajn manojn mi redonas la animon mian. «

Poste falis la papera krono de lia kapo ; ekrigardinte ĝin, li ridetis. Kelkaj voĉoj el amaso kriis :

» Metu ĝin sur lian kapon, ke li estu bruligita kun siaj sinjoroj, al kiuj li servadis. «

Liaj amikoj samlandanoj aŭdis lin preĝi kun la vizaĝo gaja kaj klara. Ĉirkaŭstaris la urbanoj kaj la popolo germana kaj eĉ multaj alilandaj pastroj ; multaj el ili diris :

» Ni ne scias, kion li antaŭe instruis aŭ diris, sed nun ni vidas kaj aŭdas, ke li diras sanktajn vortojn kaj ke li preĝas. «

Aliaj diris : » Bone estus, se li havus konfesaŭdinton. «

Tiam diris al popolo unu pastro, sidanta sur ĉevalo :

» Ne estas bezone aŭdi lin kaj permesi al li ian konfesaŭdinton, ĉar li estas herezulo. «

Sed oni tamen venigis unu pastron, por konfespreni de li ; ĉi tiu promesis doni al li la senpekigon nur tiam, se li revokos, — sed Hus rifuzis. Stariĝinte, li ekkriis laŭtavoĉe kaj bonkompreneble :

» Jesuo Kristo, ĉi tiun teruran kaj kruelan morton mi volas sufereme kaj humile elporti por la evangelio kaj predikado de Via vorto ! «

Li volis paroli plue, sed la vicgrafo Ludviko malpermesis tion, ordoninte alligi lin al la paliso. Li permesis al li nur danki al siaj gardistoj en arestejo por ilia afabla ago, kaj adiaŭi kun li. Tiam prenis lin la helpantoj de l'ekzekutisto kaj senvestigis lin ; li havis sur sia korpo du vestojn de bona drapo, ĉar havinte ofte okazon esti akceptita de la reĝo bohema kaj nobeluloj bohemaj, li ĉiam portadis tre puran veston, per arĝento traplektitan rimenon kaj post ĝi du tranĉilojn en tranĉilpoŝoj kaj unu ledan poŝon kun mono. Laŭ tiama kutimo ricevis la ekzekutinto ĉion, kion la ekzekutito havis sur sia korpo.

Poste oni kunligis lin kaj starigis al paliso, metinte ĉenon ĉirkaŭ lia kolo kaj firmiginte ĝin ĉirkaŭ la paliso. Vidinte, ke estas turnita lia vizaĝo al oriento, kelkaj ĉeestantoj opiniis, ke la herezulo ne devus esti turnita al oriento ; oni turnis lin do al okcidento. La paliso estis je ĝia akra pinto enstarigita en la teron, sub la piedojn oni metis du faskojn da ligno miksita kun pajlo, kaj ĉirkaŭ li oni kuŝigis du veturilojn da ligno ankaŭ miksita kun pajlo, tiamaniere, ke ĝi atingis lian kolon.

En la lasta momento alrajdis ankoraŭ la sendito de Sigmund, Haupt de Pappenheim, kiu lastafoje demandis Hus'on dum la ĉeesto de l'vicgrafo Ludviko, ke li per revoko savu sian vivon kaj animon. Sed Hus donis lastan respondon :

» Dio scias, ke mi neniam instruis kaj faris tion, pri kio oni kulpigas min, kaj mi sentas, ke mia animo estas senkulpa ; konfesante tiun veron, kiun mi ekkonis, instruis kaj predikis, mi volas nun kun ĝojo morti. «

Tiam la ambaŭ sinjoroj ekplaŭdinte je siaj manoj, turnis siajn ĉevalojn kaj rajdis for. Ĉi tio

estis la signo por la ekbruligo de la lignaro. Hus rigardinte al ĉielo, komencis kanti psalmojn. Baldaŭ lin ĉirkaŭis flamoj eksaltintaj el la lignaro ; kiam li komencis kanti la trian psalmon, leviĝis vento kaj metis la flamojn en lian vizaĝon ; tiam li silentiĝis, movinte nur la lipojn. Post kelkaj momentoj li estis sufokita. Ĉi tiun konstantecon kaj kuraĝon admiris eĉ la plej obstinaj liaj malamikoj.

La vicgrafo Ludviko vidinte la vestaĵon de Hus en la manoj de l'ekzekutintoj, promesis al ili anstataŭi ĝin mone kaj ordonis, ke ili ĵetu ĝin en la fajron ; ĉar la cindro kaj eĉ ĉiuj restintaĵoj devis esti ruinigitaj, por ke ĉi tio ne fariĝu relikvio en la manoj de Bohemoj. Kiam do la lignaro estis tute bruligita kaj la bruligita korpo de Hus pendis ankoraŭ je la ĉeno sur la paliso, malsuprenĵetis ĝin la ekzekutistoj eĉ kun la paliso, per bastonoj en pecetojn frapinte la ostojn ne sufiĉe bruligitajn ; ili alportis ankoraŭ lignon el tria veturilo kaj bruligis ĝin denove, por ĉion plej rapide ŝanĝi en cindron. Trovinte la kranion en la cindro, ili pecetigis ĝin per bastonegoj kaj ĵetis la pecetojn en la fajron. Ankaŭ la koron ili trovis en la restaĵoj de l'korpo ne plene bruligitan ; pintiginte siajn bastonojn, ili trapikis ĝin kaj tenante super la fajro, rostis ĝin kaj karbigis. Kiam ĉio estis cindrigita, oni kunbalais ĉion en amason, ŝarĝis sur la veturilon kaj forveturigis en la proksiman riveron Rejnon, kies ondoj forportis la cindron de Hus en la vastan maron . . .

Poste disiris la grandega amaso ; nur la Bohemoj, kiuj akompanis Hus'on, restis kaj staris flanke en granda doloro, pensinte silente pri tio, kio okazos en ilia patrujo, kiam alvenos tien la terura sciigo, kiel kruele plenumiĝis funebra sorto de l' Betlema predikinto. Ili certe vidis interne la ruĝan lumon de l' Konstanca lignaro speguliĝi sur

ĉiuj montoj, ĉirkaŭantaj ilian patrujon je ĉiuj flankoj, kaj kiel de ĉi tiu ruĝlumo komencis bruli la flamoj de l'kruelaj bataladoj, per kiuj la patrujo estis ruinigita ĝis la plej internaj profundaĵoj.

Post ne tute plena jaro, kantante kanton al Sankta Virgulino Mario, trapaŝis tiun saman vojon al lignaro la fidela amiko de Hus: Majstro Jeroným.

***

Ni alvenu nun al grava demando: El kio konsistas la signifo de Hus? Lia pensa fundamento kaj batalado devenas ja de Wikleff.

Sed kion signifus la veroj, eĉ plej puraj veroj, kies celo estas la plibonigo de l'homaro, se ili restus fermitaj en la verkoj de la kleruloj kaj se ili ne trovus apostolojn de forta volo? Sed Hus estinte pli kuraĝa kaj konsekvenca ol lia majstro mem, la veron li faris trezoro de milionoj. Estinte heroo de morala konsekvenco, li venis defendi ĝin antaŭ la koncilio kaj oferi por ĝi sian vivon. Kaj en ĉi tiu lia vero estas du specoj da progreso: La batalo kontraŭ la malordoj de la hierarĥio kaj do egale la batalo por la kristaneco pura, laŭ la senco de l'evangelio, por la kristaneco ne vorta kaj formala, sed viva. En ĉi tio ni trovas ĉe Hus boheman motivon, ĉar la *gravigo* de l'praktiko de kristaneco estas la fundamenta elemento en ĉiuj kelkafoje disirintaj direktoj de la reformacio bohema. Dua parto de l'vidpunkto de Hus, tiel kara al ni, estas lia postulado de la kritiko esplora de l'aranĝo kaj instruo eklezia sur fundamento de originalaj fontoj, de Biblio. Sur la longa vojo, kondukanta dum centjaroj de l'netolerebla kaj ofte subjektiva aŭtoritato, ordonanta blinde kredi, al emancipacio de la opinioj homaj, la batalo kuraĝa de Hus por la penso de Wikleff estas la unua granda epoko de l'nova tempo.

Hus ne intencis fondi novan eklezion; li ne predikis la instruon: »For de Romo!«. Li estimis la veran papon; li forturniĝis nur de malbona Romo kaj de malbona papo.

La eklezio, kiu per la ricevo de lia vidpunkto devus esti savita de la disigo, dum cent jaroj ĝin domaĝinta, kondamnis lin kiel herezulon, lin, kiu estis fiera je tio, ke li estas pli proksima al vero de Kristo ol liaj juĝintoj, lin, kies kredo profunda estis plej grave ofendita, kiam li estis nomita »herezulo«. Oni bruligis lin vivan, — kaj tiun, kiu estis arestita post li en la kastelo Gottlieben: la ekspapon Baltazaron Cossa, kondamnitan de l' koncilio kiel mortigisto, rabisto, herezulo k. t. p., — oni faris kardinalon.

La historio pri Hus ne estus plena, se ni finus ĉe la lignaro Konstanca. La bruligita turmentito fine festis venkon super la koncilio, kies malbenoj kaj ambaŭ lignaroj Konstancaj ne timigis Boheman nacion.

La delegitoj de l' tuta nacio, kunvenis en Praha sub la prezido de Čeněk z Vartenberka, plej alta kastelgrafo de l' regno Bohema; la 2. de septembro 1415 oni skribis longan leteron, subskribitan de multaj nobeluloj bohemaj kaj moraviaj. En ĉi tiu letero ni legas:

»Kristo ordonas: Ne faru al aliaj, kion vi ne volas, ke ili faru al vi! Ĉi tiun unuan ordonon de Sankta Skribo vi malŝatis, sed nian karan predikinton kaj instruinton, estimindan majstron Jan Hus vi metis en la fajron, kvankam vi eĉ ne pruvis al li, ke li instruis herezojn. Per tio vi por eterne domaĝis kaj mallaŭdis nian nacion, tutan regnon Boheman kaj markgraflandon Moravion. Tian malpravon ni ne povas suferi trankvile. Ni proklamas do antaŭ la tuta mondo kaj antaŭ ĉiuj homoj, ke majstro Jan Hus estis viro justa, en nia tuta regno laŭde konita pro sia vivo, siaj virtoj kaj famo, kiu ne nur

admonadis nin ĉiujn al trankvileco kaj al amo al proksimuloj per la vorto, skribaĵo kaj ago, sed li mem donis al ni ankaŭ plej bonan ekzemplon per sia vivo.«

La koncilio teruriĝis, leginte ĉi tiun festan proklamon de l' bohem-moraviaj delegitoj kaj aŭdinte, ke en Bohemujo la tuta nacio sekvas la amikojn de Hus. Bohemujo efektive ĉesis obei la eklezion Roman kaj la koncilion, kaj reĝo Václav ne malhelpis ĝin. La reĝo mortis en aŭgusto 1419. La heredonto estis Sigmund, kiu neniel intencis ŝati la boheman herezecon, malbenitan ĵus de l' papo, kiu proklamis la krucmiliton kontraŭ ĝi.

Ni devas memorigi multajn grandajn, mirindajn venkojn de Jan Žižka kaj Prokop ; la popolo Bohema estis neniam venkita. La granda venko de Bohemoj ĉe urbo Domažlice en julio 1431 plenumis la senpotencon de l' mondo kristana. Eĉ la benoj de l' papoj ne helpis la krucmilitistaron. La 28. de septembro 1431 sendis la koncilio Bazela leteron, en kiu Bohemoj estis amike invitataj al paca traktado...

Tio estis la komenco de l' cedo de koncilio, komenco de l' triumfo de Hus. Baldaŭ poste la senditoj de l' koncilio promesis en bohema urbo Cheb (Eger), ke, se Bohemoj venos en la koncilion defendi sian kaj do Husan instruon, la koncilio ne juĝos simple ĉi tiun instruon, sed ke ĝi disputos pri la vero — sur la fundamento de la leĝo dia kaj praktiko de la plej malnova eklezio!

Sur ĉi tiu fundamento iris la bohemaj senditoj Bazelon, kaj la koncilio *disputis* kun ili pri la kredo, kion vane penis iam Hus. Kaj tio estis la plej granda venko bohema dum la historio; sed tio estis ja fine — la venko de Hus!

Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède. Paris

CETERAJ GAZETOJ ESPERANTAJ:

INTERNACIA SCIENCA REVUO, monata. Red. Paul Fruictier, redaktoro de «Lingvo Internacia». Eldonantoj : Hachette & C°, 79, Boulevard Saint-Germain, *Paris*. — 7 fr.

L'ESPÉRANTISTE, monata. Red. L. de Beaufront *Louviers* (France). — 3 fr. 50.

THE ESPERANTIST, monata. Red. H. Bolingbroke Mudie. *London W*, 41, Outer Temple. — 4 frankoj.

ESPERANTO, dusemajna. *St.-Peterburgo*. Red. I. Ostrovski en Jalta. — 8 fr.

LA BELGA SONORILO, monata. Red. Jos. Jamin, *Bruselo* (Belgl.), 31, rue des Patriotes. — 3 fr.

GERMANA ESPERANTISTO, monata. Red. J. Borel, *Berlino* (Germanlando), 95, Prinzenstrasse. — 4 fr.

THE BRITISH ESPERANTIST, *London* (Angl.), 14, Norfolk Street, Strand.

ESPERO KATOLIKA, monata. *Tours* (Francl.) 72, rue des Halles. Red. P-ro E. Peltier. — 2 fr. 50.

LA SUNO HISPANA, monata. Red. Jimenez Loira, *Valencia* (Hispanl.), 3, Carniceros. — 3 fr.

LA MEKSIKA LUMTURO, monata. Red. D-ro Vargas, *Santa Rosa Necoxtla* (Meksiko, Ameriko). — 3 fr.

JUNA ESPERANTISTO, dumonata. *Genève* (Svisujo) Avenue des Vollandes.

LA SVISA ESPERO, monata. Red. Th. Renard, *Genève* (Svisujo), 6, rue du Vieux Collège. — 2,50.

ANTAŬEN ESPERANTISTOJ! monata. Red. ANT. ALVARADO, *Lima* (Peruo, Suda-Ameriko) 105, str. Lártiga, — 3 fr.

LA ALGERA STELO, duonmonata. *Alger*, (Afriko). — 2 fr. Eksterlanden 3 fr.

ESPERANTO (hungara), monata. Red. *Budapest* IV., Papnövelde-utcza 6., MARICH ÁGOSTON ; 4 fr.

L'ESPERANTISTA, monata. Red. Grafo ALBERT GALLOIS. *Riolunato* (Ital.) — 4 fr.

ĈILIO ESPERANTISTA, monata. *Santiago*, Ĉilio, Suda-Ameriko. Red. SEPULVEDA CUADRA. — 1, 50.

ESPERO DE KATALUNJO, duonmonata. Red. PAUL BERTHELOT. *Céret* (P. O.) Francujo.

ESPERANTA LIGILO, dumon. pres. laŭ Braille por blinduloj. Red. TH. CART, *Parizo*, 12, rue Soufflot. — 3 fr.

»ČESKÝ ESPERANTISTA.«

Monata gazeto por la propagando de Esperanto. Organo de l' »Aŭstria Societo Esperantista« en Brno (Moravio) kaj de la »Klubo Esperantista« en Praha (Bohemujo). Estas eldonata en kajeroj almenaŭ 16-paĝaj por jara abonpago 3.50 fr. Provaj kaj apartaj kajeroj (simplaj) po 45 centimoj.

Redakcio : la parto Esperanta — Čejka Theodor, la parto bohema — Krumpholc Josef. — *Redakcio* kaj *Administracio* troviĝas en *Bystřice-Hostýn*, Moravio, Aŭstrio.

•

Če la administracio de »Čes. Esp.« estas ricevebla :

1903-a JARKOLEKTO DE ČESKÝ ESPERANTISTA. Čefaj artikoloj nur en Esp. : Asociacio Internacia de Akademioj. Beers J. : La malsana junulo (trad. D-ro Raym. van Melckebeke, Antverpeno). Buddhisto : Du maroj (orig.) Conscience H. : En vilaĝa tombejo (trad. D-ro R. van Melckebeke). V. Černý : Kristnaska nokto (trad. E. Kühnl). Evstifeief N. P. : Kion ni povas lerni de niaj konkurantoj ? Kiel nin povas helpi niaj konkurantoj ? Al rusaj geesperantistoj ! Holub J. : Internacia korespondado de junaj Esperantistoj. Krumpholc J. : Al 150-a festo de naskiĝo de Jos. Dobrovský (kun portreto). Kühnl Ed. : Fotofonografo de Červenka (orig., kun 4 ilustracioj), Senfadena telegrafo (orig., 6 ilustr.). Prof. Ch. Lambert : Pri internacia Akademio Esperanta. Prof. D-ro T. G. Masaryk : Evoluciismo. Naživin J. : La haro de Madono (trad. Visotsky, Turkestan). Passy Fréd. : La ideo de l' paco. Poljanskij S. : Kredo je l' civilizacio (orig.). Prus B. : Ombroj. Rosegger P. : Lasta ripozo. Seleznet I. : Kanto. Tetmayer : Rememoroj. Tolstoj L. N. La letero pri Karmo. Waśniewski J. : El la libro de miaj fabloj. — Krom tio troviĝas tie gramatikaj artikoletoj bohemaj aŭ Esperanto-bohemaj kaj konstantaj ričaj rubrikoj (en Esp.) : Aforismoj, Bibliografio, Diversajoj, El la mondo, Kroniko, Organizacio de korespondado k. a. — **Prezo de plena jarkolekto 3 fr.** (kun pošta transsendo 3.25 fr.).

REVUO INTERNACIA (nur en Esperanto). Aperis 5 belaj kajeroj po 32 pĝ. (La tuto formas interesan 160-paĝan legolibron.)

Artikoloj originale verkitaj : Seleznjov : Revuoj neŭtrallingvaj. Kun lingvo internacia. Fonetiko kaj belsoneco. (15 pĝ., grava artikolo). Gabriel Chavet : Paca movado. Sirius : Evolucio de la lingvo internacia. H. Sentis : Al la sciencistoj. D-ro L. Zamenhof : Gravaj vortoj. Red. : Statistiko de l'Esperantistoj. Enketo (pri statistiko). Universitato Esperanta. Prof. F. Lallemant : Delegacio por la enkonduko de helpa lingvo internacia. — Tradukajoj : M. Gorkij : Unu fojon en aŭtuno. L. N. Tolstoj : Pri Esperanto (nova eldiro). Pri la edukado de l'infanoj. D-ro R. Adamík : Neŭrastenio (populare scienca). V. Gomulickij : Kion ne scias hirundoj kaj papilioj. Jan Neruda : Sultano. — Poemoj : Čelado (orig.) El Lermontov. Rozo kaj koro (orig.) — Krom tio tre ričaj kaj interesaj rubrikoj : Vivo internacia. El la movado de Volapŭk. Bibliografio. Revuo de revuoj. Aforismoj. Telefono (diversaj demandoj kaj interesaj respondoj de legantoj). Kroniko esperanta kaj internacilingva entute. — **Prezo 3 fr.** (kun pošta transsendo 3.25 fr.).

NOVAJ VORTOJ ESPERANTAJ donitaj aŭ aprobitaj de D-ro L. Zamenhof. Broŝuro enhavas pli multe ol 1400 da nove kreitaj vortoj. 1 ekz. po 20 centimoj (en poŝtaj markoj 25 cent.), 10 ekz. 2 fr., 50 ekz. 8 fr., čiam afrankite.

VORTARETO-ŜLOSILO POR GERMANOJ. 32 pĝ. broŝureto de oportuna poŝa formato. Tre taŭga por propagando (facile enmetebla leteron). 1 ekz. po 12 centimoj, 10 ekz. 1.10 fr., 50 ekz. 5 fr.

Centra organo de la Esperantistoj

X-a jaro — 1905

»Lingvo Internacia«

Plej malnova! Plej internacia! Plej bone informata!

Duonmonata revuo tute en Esperanto
aperas la 1-an kaj 15-an de ĉiu monato

Vivado internacia. — Aktualaj problemoj.
Literaturo.

Movado Esperantista. — Revuo de revuoj.

Adresoj. — Interŝanĝoj. — Libera parolejo.

☆

Redaktoro : *Paul Fruictier* (franco).
Administranto : *Lengyel Pál* (hungaro).
Sekretario : *William Mann* (anglo).

☆

Jara abono : sen literatura aldono 5 frankoj, kun lit. ald. 7,50

☆

La revuo estas eldonata de la

Presa Esperantista Societo

(Akcia Societo de diverslandaj Esperantistoj)

33, rue Lacépède, PARIS

☆

La presejo entreprenas ĉiaspecajn presajn laborojn